


EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道




葉硬經霜綠花肥映雪紅
一九五七年一月雲窓試作 非閑



2

1958


ELDONAS: ĈINA ESPERANTO-LIGO



La celebra kunveno de 60 mil homoj por la fondiĝo de la Aŭtonoma Regiono de Zhuang-nacio



La fama pejzaĝo sur bordoj de Lijiang-rivero



La nova Nanning-hotelo en la ĉefurbo




Fondiĝis la bela kaj riĉa
Guangxi-a Aŭtonoma
Regiono de Zhuang-nacio.

La Popola Parko de Nanning



La Monto Elefantonazo de Guilin



Ĉe Ni Ne Estas Vintro

Lasttempe en rondo de miaj amikoj, ni ĉiuj diris ke la klimato de Pekino fariĝas ŝajne pli kaj pli varma, jaron post jaro, kaj la vintro fariĝas ĉiam pli mallonga tiel ke eĉ kvazaŭ tute ne ekzistas.

Ni bone memoras, ke dum nia infanaĝo, la Pekinaj vintroj estis tre longaj. Nokte kuntiriĝinte sub la litkovriloj, ni ĉiam aŭdis la muĝon de norda vento teron balaanta kaj la diablan sibladon de la fenditaj fenestropaperoj dum la tuta nokto. Matene subbrakante la libro-pakon, ni paŝis kontraŭ vento kun klinita kapo. Meze sur la tervojo la neĝo premita de ĉarradoj fariĝis kotaj sulkoj. Ofte ĉe senatentaj paŝoj en la koton, la vatitaj ŝuetoj profundigis en ĝi kaj estis ne eltireblaj. Je fermitaj pordoj ambaŭflanke de stratetoj ĉiam kuŝis homoj kuntiriĝintaj, almozuloj, rubkolektantoj. . . . kun de frosto purpuraj vangoj kaj tremantaj membroj, kun ĉifonaj vestoj pendantaj sur la korpo kvazaŭ velkintaj folioj, kaj aŭdigantaj intermitajn ĝemojn. Ekvidinte la suferantajn figurojn, ni nekonscie rapidigis la paŝojn, kaj ĝuste en la momento de urĝemo kiam ni malzorgis pri la vojo, niaj vatitaj ŝuetoj ekprofundiĝis en la koton!

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Kultura Gazeto
Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Adreso: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

ENHAVO

Bildo sur la kovrilo — Kamelio kaj Papilioj

(de Yu Fei-an)

Rapida Transformiĝo

Ili Atendas Siajn Mastrojn

Filmado kun Francaj Amikoj

Riĉa Lando, Bela Estonteco

Feriaj Tagoj en la Hejmvilaĝo

Shang-dinastio

Deveno de la Fajro

La Ĉina Ŝako

Kial Fonetika Alfabeto de Han-lingvo?

Bildo sur la dorsa kovrilo — Miao-nacianoj

Iras al Sijaj Parencoj (Pentris Zhou

Ling-zhao)

Precize tiel, kun frostiĝo, kuntiriĝo, koto. . . . pasadis longaj kaj palflavaj monatoj. Kaj subite, ni eksentis varmon kaj demetis la vatitajn vestojn. Ja la printempo jam alvenis! Sed oni ne longe portis printempajn vestojn. Post kelkaj tagoj, oni devis alivesti sin denove per varmsezonaj vestoj, ĉar la somero jam alproksimiĝis. Tial ni ĉiam diras, ke la printempo ne ekzistas en Pekino.

Tute aliaj estas la vintroj en lastaj jaroj. Same ventas kaj neĝas en Pekino, sed neĝo estas nete amasigita ambaŭflanke de la stratoj en ordo. Sur la glata asfalta pavimo post sunumado kaj ventblovado, neĝo kvazaŭ tute ne falis. Plej ĝojiga tamen estas tio: ĉe la stratflankaj pordoj ne plu videblas la suferantaj figuroj kaj ne aŭdeblas la intermitaj ĝemoj. El la pordoj nun eliras infanoj kaj geviroj junaj kaj maljunaj, kiuj iras al lernejoj, fabrikoj kaj oficejoj. En modestaj sed puraj vestoj kaj kun kvieta rideto sur la lipoj, ili marŝas kun levita kapo kaj elstaranta brusto.

Precipe en la pasinta jaro, 1957, kvazaŭ ja ne venis la vintro. Kvankam ankaŭ iam ventis, neĝis, kaj glaciigis riveroj, sed neniam aŭdigis la vorto "vintro". La esprimoj, "vintra distriĝo", "vintra neokupateco" kaj "vintra dormado" jam fariĝis arkaismo. Kiam mi skribas ĉi tiujn liniojn, oni ankoraŭ ne demetis la vatitajn vestojn, la glacio de Beihai-lago ankaŭ ne degelis, nek herboj nek salikoj verdiĝis, sed la printempa aromo jam saturas la urbon.

Fakte, ne nur Pekino. Sur nian vastan landon, en korojn de niaj 600,000,000 popolanoj, vintro ja neniam venis!

Kompreneble, ne la vintro ne venis, sed en la revolucia entuziasmo flame ardanta kaj tajde leviganta kaj ĉe la devizo: "la jarkvinon decidis la unuaj tri jaroj, la jartrion la unua jaro, kaj la unuan jaron la antaŭiranta vintro", ni, sur kampoj, ĉe riverbordoj, en konstruejoj, unuanime kaj unucele antaŭenigis la printempon je tri monatoj, la luma kaj varma printempo kiu regas en la koroj de la popolanoj jam forsolvigis la rigoreman vintron. Tio estas la unua granda antaŭensaltego dum jar-miloj! De nun vintro perdos sian tradician signifon, kaj fariĝos uverturo de printempo!

Ni ne kantu, kiel la angla poeto Shelley verson de mola konsolo kaj sopiro: "Se venis la vintro, ĉu printempo malproksimas?" Ni simple diru proze: "Ĉe ni ne estas vintro!"

Esperantigis AŬRORO

Printempa Zefiro

Li Pei-xian

Herbejon karesas printempa zefiro,
Pli frue leviĝas mi ol la aŭroro.
La teron pleniĝas printempa inspiro,
Printempo rebrilas en mia junkoro!

Patrio, ja ŝipo antaŭen kuranta,
Pleniĝas de ni, junularo feliĉa;

Per saĝ' oceana kaj forto giganta,
Ni pentras pri ĝi majest- kaj belriĉa.

Sur vento printempa mi volas flugadi,
Milfoje saluti la panjon patrian;
Kaj kune kun ŝi ŝvitanta spiradi,
Al ŝi bondeziri junecon por ĉiam!

Elĉinigis Laŭlum

Konstruado de Granda Hidroelektra Centro

POR Ĉinio la grandtipa Hidroelektra Stacio de Xin'an-rivero estas la unua en sia speco. Esplorlaborojn, projektadon, konstruadon kaj ankaŭ la fabrikadon de elektraj ekipaĵoj plenumas ni ĉinoj mem. La granda riverbrida digo de la hidro-

elektra stacio altas je 105 metroj. La produkta kapacito de la instalota maŝinaro estos 580,000 kilovatoj, 20 obloj de tiu de la Hidroelektra Stacio Guanting en Hebei-provinco. Ĝia elektroprodukta kapacito estas je 15,000 kv. pli granda ol tiu de la fama Hidroelektra Stacio Fongman, la plej granda nun en la nordorienta Ĉinio. Post la finkonstruo de la stacio formiĝos forta elektreja centro, kiu liveros elektron al la tuta regiono sur la suda bordo de Yangzi-rivero inkluzive Ŝanhajon, Hangzhou, Nankinon k. a. urbojn, kaj ankaŭ bridos akvegdon de la rivero Xin'an. Ĝi faros grandan puŝon al la fortigo de n'a elektra industrio kaj akcelos la agrikulturan disvolviĝon de la orienta Ĉinio. Ĉar tio ŝirmos 300,000 muojn da tero kontraŭ inunda katastrofo kaj navigebligos la malsupran parton de la rivero al ŝipoj de cent tunoj, kaj la akvokonservejo fariĝos granda bredejo de fiŝoj kaj anasoj. La jaran enspezon sole de fiŝbrede oni taksas je 1,400,000 jŭanoj.

La helpaj konstruoj de la stacio jam komenciĝis je aŭgusto de la jaro 1956, kaj la ĉefan konstruadon mem, oni komencis je aprilo, 1957. Laŭ la antaŭa plano elektroelsendo komenciĝos je la jaro 1961. Sed post la alvoko de la Centra Komitato de Ĉina Kompartio "atingi aŭ superi la anglan produkto-kvanton en ĉefaj industrioj kiel tiuj de fero kaj




Foto de Yang Chun-ĵing

ŝtalo en la daŭro de 15 jaroj aŭ iom pli", la konstruantoj de la stacio ricevis grandan instigon, kaj decidis plifruigi la elektroelsendon je unu jaro.

Nun oni jam komencis la betonadon de la riverbrida digo. Je la 17a de feb. estis finitaj la laboroj de fosado, borado, betonado, lavado por la unua betonada betonplataĵo ĉe la fundamenta fosajo de la digo, dank' al la kolektiva penado de 15,000 laboristoj kaj oficistoj. La sekvantan tagmezon, la gvidantoj kaj ĉefinĝeniero de la stacio kontrolis kaj aprobis la faritajn laborojn. Ĝin sekvis tuj la betonado de la digo mem. La ceremonio de ĝia komenciĝo okazis posttagmeze en la sama tago.

La investo por la stacio estis laŭ plano 468,800,000 jŭanoj. Post la kampanjo kontraŭ malŝparo, la tuta laborantaro faris diversajn klopodojn kaj reduktis la sumon al 403,840,000 jŭanoj.



Tiel ĝi aspektos post finkonstruo

Rapida Transformiĝo

(Daŭrigo de p. 43)

ĝinoj estas atingeblaj sen malfaciloj. Kelkaj vilaĝoj eĉ proponis strebi al 703 ĝinoj. . ."

Sekve la cifero de 400 ĝinoj estis forjetita kiel tro konservativa. La ambicio estis nun transpasi la Flavan Riveron kaj alproksimiĝi al Yangzi-rivero.

Preskaŭ samtempe disvastiĝis alia novaĵo ke en la vespero de la 11-a, feb., la sekretarioj de la partiaj filioj de la vilaĝoj laŭ la instrukcio de la gubernia komitato havis tutnoktan kunsidon kaj decidis ke en la daŭro de unu semajno antaŭ la jarfino laŭ la luna kalendaro, oni mobilizu la popolamasojn plibonigi kaj plialtigi tra la tuta gubernio bazon de ĉiuj ŝoseoj, kies longeco ampleksas 1,400 liojn, por ke per ili pli granda inundo kaj pluvakvo povu esti ankaŭ disigita en diversaj regionoj kaj la celata produktokvanto de 500 ĝinoj estu garantiata kaj krome sur tiuj ŝoseoj de la gubernio libere moviĝu ĉevalĉaroj kaj aŭtomobiloj.

La sekvantan tagon la sekretarioj de vilaĝaj partifilioj kiuj diskutis tutan nokton, revenis al sia hejmo kaj tuj gvidis la ŝoseorekonstruan armeon al nova batalo.

* * *

Antaŭ tiu, kiu forlasis Xushui-gubernion antaŭ tri monatoj kaj jus revenis, prezentiĝas tute nova naturaspeko. Post nur mallonga vintro la frostitaj

kampoj jam estis plugitaj. La digo de la ebenejaj akvokonservejoj estas disŝutantaj odoron de nova tero. La ŝoseoj distranĉas la ebenon en kelkajn grandajn pecojn. La montoj kaj montetoj kvazaŭ estis subtile gravuritaj. En la nuna jaro la pluvego jam havos nenian terenon por sia tiraneco. La brulanta suno ne povos elsekigi plu la vastan kamparon. Rigardu! Kiam alvenos aŭtuno, la ebena de la norda lando prenos aspekton de akvoplana kamparo de la sudo. Kaj aŭskultu! Tra la telefono de la oficejo de la gubernia partikomitato alvenos seninterrompe raportoj pri ĝojigaj novaĵoj de riĉaj rikoltoj el la pli ol 200 agrikulturaj kooperativoj. La juna sekretario de la gubernia komitato Zhang Guo-zhong certe denove palpebrumos al mi senĉese kaj ridante diros: "Ni atingis 500 ĝinojn!"

Trad. Pandiŝo

1. Laŭ la Reviziita Provprogramo por Agrikultura Disvolviĝo (1956-1967), la celciferoj de jara produktokvanto de greno po muo por la diversaj partoj de Ĉinio estas fiksitaj jene: norde de la Flava Rivero, 400 ĝinoj; inter la Flava Rivero kaj Yangzi-rivero, 500 ĝinoj; sude de Yangzi-rivero, 800 ĝinoj.
2. Landskala debato organizita en vilaĝoj por diskuti kiun vojon la kamparanoj sekvu: ĉu la kapitalisma aŭ la socialisma.
3. Metodo elpensita de la kadroj por profundiĝi en la amason kaj studi produktajn problemojn.

KIU ajn alvenas al la vilaĝoj de Xushui-gubernio, tiu tuj rimarkas la okulfrapan sloganon per kreto skribitan sur la muroj:

“Garantiu la produkton de 400 ĝinoj po muo kaj penu atingi la produktan normon trans la Flava Rivero!”

400 ĝinoj! Tio estas la mezkvanto de produkto de grenoj po muo fiksita en la tutgubernia plano por 1958.

400 ĝinoj! La cifero signifas, ke la kamparanoj de Xushui-gubernio planis plifruigi je 9 jaroj la plenumon de la celita cifero de grenprodukto po muo fiksita en la Reviziita Provprogramo por Agrikultura Disvolviĝo (1956-1967).

400 ĝinoj! La cifero signifas preskaŭ duobligon de la meznombra produktokvanto po muo, kiun la kamparanoj de Xushui-gubernio realigis en la jaro 1957.

La tutgubernia meznombra produktokvanto de 400 ĝinoj po muo estas cifero kiun neniu kuraĝis imagi en antaŭaj jaroj. Dum la kvin jaroj de 1953



Sterkokolektado Lignogravuraĵo de Chen Pei-ling

Zhang Chao:

Rapida

ĝis 1957, ĉiujare la kamparanoj suferis inundadon aŭ sekecon, kaj la produktokvanto po muo en 1957, la plej bona jaro, estis nur 214 ĝinoj, dum tiu en 1954, la plej malbona jaro, 78 ĝinoj, por ne diri pri la pli frua pasinteco. Kiu kuraĝus imagi en la antaŭaj jaroj, aŭ eĉ en lasta aŭtuno, ke la produkto atingos 400 ĝinojn ĉijare?

Zhang Guo-zhong, la juna sekretario de la gubernia partikomitato, iam enprofundiĝinte en ĉefpuktan vilaĝon kaj post peniga instigado kuraĝis nur proponi 300 ĝinojn, kiel celciferon nur de unu vilaĝo. Antaŭ nelonge mi renkontis lin en la kunveno de kvargradaj kadroj en Hebei-provinco. Senĉese al mi palpebrumante, li diris ridante: “Tiam mi povis esti rigardata kiel aktivulo. Sed nun kiel vi vidas, la slogano de 400 ĝinoj estas afiŝita ĉie en la vilaĝoj de la gubernio. Retrorigardante hodiaŭ, mi devas kalkuli min kiel konservemulon.”

La naŭan de feb. Zhang donis tre kortuŝan paroladon en la kunveno. Li diris, ke en la lastaj kelkaj jaroj Xushui-gubernio, kiel multaj aliaj gubernioj en Hebei-provinco, suferis aŭ superakvegdon aŭ senpluvecon. Konsekvence ĉiujare la kamparanoj estis devigataj sin nutri per greno enportita el aliaj provincoj. De 1954 ĝis la unua duonjaro de 1957, estis enportitaj entute pli ol 90,000,000 ĝinoj da greno. Specialaj oficejoj por helpado estis starigitaj ĉie de la guberniurbo ĝis la vilaĝoj. La seninterrompa helpolaboro al la katastrof-suferantoj konsumis grandan parton de energio de la gvidantaj instancoj. Krome, la kamparanoj organizitaj en kooperativojn ne volis toleri la konstantan minacon de tiaj naturaj katastrofoj. Post la granda debato pri socialismo en vilaĝoj² lastaŭtune estiĝis situacio de antaŭensaltego tra la tuta lando, kiu multe stimulis la agemon de la kamparanoj kaj la kadroj en Xushui-gubernio. Per saltego ili sin ĵetis antaŭen, proponante la sekvan-tan heroecan devizon:

“Garantiu la produkton de 400 ĝinoj po muo kaj penu atingi la produktan normon trans la Flava Rivero!”

Sed la produktokvanto de 400 ĝinoj ne povas esti atingita per nura devizo. La kamparanoj kaj la kadroj sin organizis en tri armeojn, por ŝturmi la irigaciadon, porkobredadon kaj teknikon, mar-

Transformiĝo

ŝantaj ŝultron ĉe ŝultro sur du batalfrontoj—la agrikultura kaj bestobreda produktadoj. Ili kreis vicon da mirindaj atingoj en la mallonga daŭro de tri monatoj.

En iu kunsido Zhang pendigis grandan landkarton kaj montrante per bambubastoneto kiel instruisto de geografio la skemon plenan je grandaj kaj malgrandaj cirkloj, li diris, ke en Xushui-gubernio ni fundamente efektivigos la planon de irigacio ĉijare. Krom la ekzistantaj fosajtoj, putoj kaj lagetoj, ni konstruis sur 80% de la areo grandnombrajn dense lokitajn ebenejn akvokonservejojn kaj fosis ĉirkaŭvilaĝajn kanaletojn al ĉiu vilaĝo. En la monta regiono (inkluzive la monteton), kiu okupas la restantajn 20% de la areo, ni fosis ĉie "skvam-akvujojn", akvonivelajn fosajetojn, akvokelojn kaj konstruis multe da grenejoj kaj fosaj-protektajtoj kaj unu mezgrandan akvokonservejon. Troviĝas nun multaj 'virin-akvokonservejoj', 'ruĝkravat-akvokonservejoj', 'geedzo-keloj', 'fratinkeloj', 'patrofil-putoj', 'frat-putoj' kc. nomitaj laŭ la konstruintoj. Tiamaniere la irigaciataj kampoj plimultiĝis de 42% ĝis 97% el la agraro en la tuta gubernio kaj de nun la popolanoj de Xushui-gubernio jam ne timos tian superakvegon kian en 1954 aŭ tian senpluvecon kian en 1957. Tio estas la plej brila batalrezulto de la irigacia armeo.

Por atingi 400 ĝinojn, tio tamen ne sufiĉas. Samtempe komenciĝis en Xushui alia antaŭensaltego en porkobredado, en proporcio sep dekonoj komuna kaj tri dekonoj privata. En tri monatoj oni sendis pli ol 160 kadrojn al Hubei-, Shandong-, Henan-, Liaoning- kaj Shanxi-provincoj por aĉeti 280,000 bonspecajn porkidojn. Antaŭ la fino de la kuranta jaro la nombro de la porkoj en la tuta gubernio leviĝos de 37,000 kiel en la pasinta jaro ĝis 580,000. Do estas certigite ke oni povos akiri 10,000 ĝinojn da sterko por ĉiu muo.

Por garantii al si 400 ĝinojn da greno, Xushui-gubernio fondis teknikan armeon. Laŭ la principo "Kian teknikon oni trovas malfacila, tia trejna kurso estu malfermata," 4,000 teknikistoj estas eltrejnitaj por diversaj fakoj: porkobredado, kulturado de fruktoarboj, bestkuracado, kortbirdobredado kaj maŝinriparado. De la sekretario de la gubernia partikomitato ĝis la kadroj de la agrikulturaj kooperativoj, ĉiuj ekkulturis eksperimentan agron.³

Por bone gvidi la kamparanojn de la tuta gubernio transpasi la Flavan Riveron kaj alproksimiĝi al Yangzi-rivero¹ estis ja bezonata komandanta stabo kiu kapablas lerte organizi la batalojn. La gubernia partikomitato ĝisfunde forigis la antaŭan suprajn ĝeneralan gvidstilon kaj kreis jenajn novajn gvidmetodojn: "Plifortigi la unuan batallinion kaj kuntordi en unu ŝnuron", "Elstarigi la ĉefan punkton kaj akordigi al ĝi de ĉiuj flankoj; dividi en batalfrontojn sed unuigi la gvidadon." Ĉirkaŭ la centro—disvolvi irigacion kaj brede porkojn por prepari sterkon—la gubernio metis siajn ĉefajn fortojn en la unuan linion kaj ĉiuj gubernigradaj instancoj estis organizitaj en unuigitan proviztaĉmenton. La tuta batalkampo estis dividita en du batal-frontojn, agrikulturan kaj bestobredan. Batalon post batalo kaj kulminon post kulmino, la stabo gvidis pli ol 300,000 kamparanojn sukcese fini la unuan decidigan vintran batalon en tiu ĉi jaro.

Tio estis la transformiĝo okazinta en la mallonga tempo de tri monatoj.

* * *

Sed la situacio ankoraŭ ĉiam rapidege ŝanĝiĝas.

La trimonata ŝanĝiĝo ankaŭ estigis novan problemon: Ĉar 97% de la agroj estas jam irigaciataj, 10,000 ĝinoj da sterko po muo estas jam certaj kaj nova teknika armeo estas formita, ĉu la cifero de 400 ĝinoj po muo ne estas tro malalta kiel celo por alstrebado?

En tiuj tagoj Zhang Guo-zhong kaj liaj kolegoj estis ĉiuhore kaj ĉiuminute kvazaŭ turniĝantaj en torento. Dum la kunveno de kvargradaj kadroj, la informoj pri la laborentuziasmo de la amasoj ĉiutage venis de la gubernio kaj la atmosfero de antaŭensaltego en la kunveno ĉiumomente ekscitis la ĉeestantojn. Ili estis tage kaj nokte pesantaj, ĉu la celcifero ne estas tro malalta.

En la vespero de la dekdua, feb., ili telefone konsiliĝis kun aliaj sekretarioj Yang Guo-hua kaj Liu Bu, kiuj estis restantaj en gubernia partikomitato: "Ĉu ni plialtigu la ciferon ĝis 500 ĝinoj, kaj celu al 600 ĝinoj! Kiel vi opinias? Denove interkonsiliĝu kun la reprezentantoj de la vilaĝoj!" Tiuvespere Yang kaj Liu respondis decideme, "500

(Daŭrigo sur p. 41)

Elfosi sterkon el riverfluejo Pentris Liu Yu-bin



Fu Dong:

Bolas Entuziasmo

— Skizo pri la konstruejo de la Dektri-maŭzolea akvokonservejo —

TRAPASINTE la urbeton Changping, mi tuj vidis aron post aro da homoj marŝantaj en la direkto al la Dek Tri Maŭzoleoj de Ming-dinastio kun litajpako sur la dorso. Evidente ili estis irantaj al la konstruejo de la akvokonservejo.

Abunde aperis novaĵoj pri la akvokonservejo sur la paĝoj de la ĵurnaloj en lastaj tagoj. Multaj laborantoj de ŝtataj instancoj, ankaŭ konkurence sin anoncis por partopreni en ĝia konstruado. Oni diras, ke tiu ĉi akvokonservejo okupos areon trioble pli grandan ol Kunming-lago en Yiheyuan-parko, Pekino, kaj entenos dudekoble pli multe da akvo. La digo longos je pli ol unu lio kaj altos kiel oknaŭ-etaĝa domo. La tero tien transportota estos pli multa ol tio por Guanting-akvokonservejo je pli ol duono. Mi memoras ke Guanting-akvokonservejo konstruiĝis en la daŭro de tri jaroj, sed tiun ĉi akvokonservejon oni planis finkonstrui en tri-kvar monatoj. Tio estas ja surpriza!

Kiam mi alvenis al la konstruejo, la unua impresio estas majesteco. Sur la laborejo, kiu estas kvar aŭ kvin liojn longa kaj pli ol unu lio larĝa, svarmas pli ol dudek mil laborantoj. Sur la montoj kaj ĉe la montpiedoj, ĉie estas homamasoj. Kelkaj buldozoj estas funkciaj sur du montoj. Ĉar ilia irado estas oblikva anstataŭ horizontala, vidate de malproksime ili ŝajnas pendantaj sur montodeklivo. Sur la ebenejo dekelkaj buldozoj kaj traktoroj sin okupas pri firmigo de la digbazo. Ĉie sur la labortereno sin disetendas kiel araneaj portempaj relvojetoj, sur kiuj sennombraj homoj puŝas ĉarojn por transporti teron. Ili kvazaŭ kuras, kvazaŭ flugas. Mi supozis ke la ŝarĝoj en la ĉaroj estas ne tro pezaj, sed poste informiĝis kaj saltis de surpriziĝo ke ĉiu ĉaro entenas unu tunon.

Mi decidis iri al la proviza sekcio por informiĝi pri la kondiĉoj de la provizaĵoj. Mi pensis al mi mem, ke almenaŭ centoj da homoj devus sin okupi por la provizado al tiom granda kaj multhoma laborejo. Tamen, kiam mi atingis la sekcion, mi trovis nur kelkajn laborantojn en malgranda domo. Iu kadro estis telefonanta. Remetinte la aŭskultilon li turnis sin al mi kaj diris: “Neniam antaŭe tiel

glate iris la laboro kiel nun. Nur menciuj la nomon, ‘la Dektrimaŭzolea Akvokonservejo’, la efiko estas mirinda. Ĉia ajn malfacilaĵo povas esti solvita en kelkaj minutoj.”



Kiam mi esprimis mian intencon intervjui iun aĉetiston, oni respondis ke ĉe ili sin trovas neniu aĉetisto. Neniu aĉetisto? Mi stultiĝis. Ridante ili diris al mi: “Aliflanke oni ankaŭ povas diri ke niaj aĉetistoj estas tre multnombraj.” Mi ne povis kompreni kion tio signifas. Iu el la laborantoj klarigis plue: “Preskaŭ ĉiuj objektoj ĉi tie bezonataj estas donacitaj, pruntedonitaj aŭ luitaj. Nur malmultaj estas aĉetitaj. Por pruntepreni ion, ni nur petu kaj ĝi estos baldaŭ alportita. Aŭdinte ke nia akvokonservejo bezonas malpezajn relojn, Qinghe-brikfabriko tuj alsendis la siajn senprokraste. En aĉetado ni nur telefonu kaj la vendejoj tuj sendos al ni la petitaĵojn.”

Dum ni interparolis, intermetis alia kamarado: “Nuntempe la tuta Pekino estas nia proviza sekcio

kaj ĉiuj estas niaj aĉetistoj.” Li rakontis plue ke antaŭ kelkaj tagoj por elpreni varojn el iu tenejo en Pekino, li renkontis tie tri ŝarĝoportistojn, kiuj aŭdinte de kie li venis, proponis surĉarigi por li la varojn. Sed tio ne estis ĉio. Ili poste eĉ sekvis la ĉaron al kelkaj aliaj lokoj por helpi la ŝarĝadon, malgraŭ ke li plurfoje persvadis ke ili ĉesu kaj reiru. Ĉe adiaŭo ili rifuzis akcepti kiel rekompencan eĉ unu moneron. Ĉar tiuj tri ŝarĝoportistoj jam sin anoncis por servo en la konstruado de la akvokonservejo sed ne estis akceptitaj. Kaj nun ili trovis la bonan ŝancon.

Mi reiris al la konstruejo kie mi vidis amasegon da soldatoj de la Popola Liberiga Armeo trans-



portantaj teron de la monto malsupren. Malgraŭ la malvarmega vetero kelkaj el ili, portis sur si nur ĉemizon kaj ankoraŭ ŝvitis.

De iu armeano mi sciigis, ke por transporti la teron (uzatan por la digo) al la centro de la laborejo, la tuta ira kaj reira distanco estas pli ol sep lioj. En la komenco oni povis nur transporti ses fojojn ĉiutage, pliposte sep, sed nun jam ok fojojn. Alivorte, kvin personoj puŝante ĉaron kun ŝarĝo peza je 2,000 ĝinoj piediras sesdek liojn ĉiutage.

Parolante kun mi, li subite montris al mi iun personon: “Jen nia politika komisaro Bian, ankaŭ li puŝas ĉarojn kiel ni ĉiuj de mateno ĝis vespero.” Ĵus fininte sian parolon, li ekmontris al mi alian personon: “Tiu estas nia kuracisto. Ankaŭ li venas puŝi ĉarojn. Bravuloj ili ja estas!”

La armeano Zhang Jin-xuan, kun kiu mi interparolis, laboris kun vera entuziasmo. Li certigis: “Ni devas ne nur bone gardi nian ĉefurbon, sed ankaŭ bone ĝin rekonstrui.”

Irinte nordokcidenten, mi rimarkis inter la amaso knabinon kun lana tuko sur la kapo. Kiam mi estis ĵus al ŝi ekparolonta, ŝi jam sursultrigis la vektan kaj foriris kun tero portata. Apuda maljunulo fingrumis ŝin al mi kaj diris: “Jen estas Zhou Man-xia, alkamparosendita kadrino de la Petrola Instituto. Kvankam ŝi venis al nia kooperativo nur du monatojn, tamen ŝi laboras tre bone. Rigardu! Kiel facilmove ŝi vektumas la du korbojn da tero pezanta cent ĝinojn!”

Ekaŭdinte kriojn “Penu! Penu!” sur la okcidenta montsupro, mi paŝis al tiu direkto. Mi trovis ke estas junuloj de la Kvina Taĉmento, kiuj ĉiam tiel sin interinstigas konkurante kun la anoj de la Popola Liberiga Armeo laborantaj ĉe la montoflanko. Post kelktempa laborado ili kune eksidas kaj komencas ĥore kanti:

.....

Samtakte ni ekmarŝas en la valon
Kun firma kred' por gajni la batalon.

.....

Ĉe l' Dek Tri Maŭzoleoj, ni rapide
La akvan konservejon finkonstruos.
Per granda pen' certigu ni solide
Ke baldaŭ vivon belan ni ekĝuos.

.....

Ni, mastroj de l' patrlando,
Heroaj montrompantoj.
Klopodoj en la hodiaŭo
Feliĉon donos en morgaŭo.
Per niaj propraj manoj, cerb' kaj ambicio
Prosperu nia grandioza la patrio.

.....

Kiu verkis tiun ĉi kanton? Oni sciigis al mi ke ĝin verkis Li Zheng-tai, iu juna kamparano en tiu taĉmento. Ankaŭ la muziko estas komponita de

Al la konstruejo tuj post elkrepuskiĝo



li mem. Li diris ke lia granda emociiĝo post alveno al la laborejo motivis lian verkadon de la kanto.

La direktanto Yu De-run diris. "La bolado de laborentuziasmo de la popolamasoj estas ne senkaŭza. En la pasinteco la loĝantaro ĉi tie suferegis pro ofta inundado. La akvokonservejo certe likvidos por ni la minacon de superakvego. Utiligante la akvon konservitan, ni povos irigacii tricent mil muojn da tero. Krome, ni ankaŭ povos bredi fiŝojn kaj anasojn. Plie, ni havos elektran lumigadon." Ju pli li parolis, des pli li flamiĝis, kvazaŭ belega perspektivo jam aperis antaŭ liaj okuloj.

Krepuskiĝas. Subite eklumiĝas la tuta laborejo. Pli ol cent serĉlumoj prilumigas ĝin tiel hele kiel tage. Kiel familiaraj tiuj serĉlumoj estas al ni! Ĉiujare en la Unua de Majo kaj la Nacia Tago ni

vidis ilin antaŭ Tian-an-men. Ili lumigis la afablan vizaĝon de Prezidanto Mao. Ili ankaŭ prilumigis la gajajn popolamasojn. Ili nun brilis en la laborejo. Aŭskultante la muzikon el la megafono, mi sentis, kvazaŭ mi starus antaŭ Tian-an-men kaj vidus la popolanojn dancantajn en ekstazo. Jes, ĉiuj tie ĉi estas ankaŭ dancantaj, sed ili dancas per la dancopaŝoj de konstruado, per la dancopaŝoj de socialisma laborfervoro!

Estis jam la naŭa aŭ deka vespere. Sed la redaktoroj de la 'Gazeto de la Dektrimaŭzolea Akvokonservejo' ankoraŭ diligentis super la manuskriptoj, kiuj amasiĝis kiel monteto sur la skribotablo. Ili diris ke tiel multaj estas modelaj personoj kaj agoj, kaj la dutaga eldono jam ne povas kontentigi la bezonojn, kaj pro tio lastatempe oni

ANTAŬ pli ol unu monato, sepdek ses belartistoj kaj belartaj laborantoj alvenis al la Amikeca Agrikultura Kooperativo en Zhuanqiao-vilaĝo, Ŝanhajo, por sin hardi en agrikultura laboro.

Ili formis socialisman bildon de printempa plugado per siaj vivpasio, sarkiloj, feraj rastiloj, sensancela volo kaj laborfervoro.

Jen ĉe okcidenta kamprando ok-naŭ kamparanoj sarkas herbaĉojn en unu vico, sur orienta kampvoĵeto aro da kamparanoj alvenis kun puŝĉaroj da legomoj, kaj tra bambuaro, trans ponteton iras homoj kun portiloj surŝultre al la riverbordo por porti ŝlimon. Ĉie kie amasiĝas kamparanoj troviĝas ankaŭ niaj pentristoj. Iuj el ili vestis la kapon per tuko kaj surmetis antaŭtukon, aliaj alte refaldis la pantalonubojn kaj portas cent-ĝinan ŝarĝon sur la ŝultro. Kvankam la vestoj estas diversaj, sed iliaj vizaĝoj estas same sunbrunigitaj;

Balaaĵo estas taŭga por sterko
de He You-zhi



Xu Kai-lei:

Bildo de Print

kaj iliaj vestoj, kotomakulitaj. Apenaŭ oni povas distingi kiu estas malnova kooperativano kaj kiu, antaŭ pli ol unu monato, ankoraŭ sidis en sia varma ĉambro cerbumante por trovi subjekton por pentraĵo.

Ĉe la rivereto, du homoj fosadas ŝlimon sin klinante, du aliaj levadas la ŝlimon per korboj, kaj pli multaj ŝultro-portas ŝlimon per vekto kaj korboj. Sur ĉies vizaĝo montriĝas ĝojo. Videble ĉi tiuj belartistoj vere rigardas la ŝliman rivereton, kiu neniam aperis sur iliaj bildoj en la pasinteco, kiel plej belan lokon. Iu junulo subite demetis siajn ŝtrumpojn, kaj saltis en la rivereton kun sitelo por elĉerpi akvon. Ĉar, se la akvo estos elĉerpita,

**"K-do, surmetinte ĉi sandalojn
vi ne plu glitiĝos."**
de Wang Guan-qing



intencis anstataue ĝin eldoni ĉiutage. Ili diris aldone ke kvankam la anoj de la redakcio povas dormi nur kelkajn horojn ĉiunokte, tamen la legado de tiom ardigaj novaĵoj tute forviŝis ilian lacon.

Alveninte al la centra stabejo, mi trovis ke elektraĵoj en ĉiuj ĉambroj estas lumantaj. Mi volis interparoli kun iu, sed timis ke eble la deĵoro estis jam finiĝonta. Rimarkinte mian hezitanon, iu kamarado alparolis min: "Bonvole eniru! Nia oficejo estas de 'kvar sen': sen vintro, sen nokto, sen ferio kaj sen deĵor-komenciĝo kaj deĵor-finiĝo, ĉar ĉiam troviĝas ĉi tie homoj en sia deĵor-vico. Eĉ je la tria horo en la profunda nokto, vi povas trovi laborantojn."

Liton mi trovis tiun nokton en la kuracostacio. Sed miaj okuloj ne fermiĝis la tutan nokton kaj mi

neniel povis trankviliĝi kaj endormiĝi, ĉar la homoj kaj la okazaĵoj kiujn mi renkontis en la tago turniĝadis en mia kapo. La muĝado de traktoroj kaj muzikoj el la megafono ankaŭ ne interrompiĝis la tutan tempon. Mi pensadis pri tiuj kortuŝaj scenoj, kaj intencis trovi taŭgajn vortojn por ilin priskribi, sed vane. Mi opinias ke troviĝas neniu taŭga vorto por dece redoni la laborentuziasmon de socialismo, de komunismo. Niaj lando kaj popolo estas ne marŝantaj, nek kurantaj paŝon post paŝo, sed, kiel la armeanoj asertis, "flugantaj kiel ĵetaeroplano."

Forlasinte la laborejon, mi vidis denove aron post aro da homoj marŝantaj al la laborejo kun litajpako sur la dorso. Ili iris pasigi la Printempan Feston en laborado.

Trad. Cipaonin

empa Plugado

oni povos akiri pli multe da fekundiga ŝlimo por plialtigi la agrikulturan produkton.

Sub tegmenta rando ĉe vilaĝa fino, kvar pentristoj interkonsiliĝas por fari sian programon. Ili jam aĉetis olelampon por lerni ĉiuvespere. Ili decidis ankoraŭ daŭrigi la artan praktikon en liberaj horoj post agrikultura laboro, kaj pentri bildojn en pluvaj tagoj senlaboraj kaj ilin montri cirkule en ĉiu vilaĝo por riĉigi la kulturen vivon kaj plintimiĝi kun la kamparanoj. Laŭ la programo ili proponos, ke ankaŭ aliaj pentristoj agadu kun ili.

Okcidente de la ŝoseo estas Zhuanqiao-urbeto, kie la pentristoj helpas aranĝi ekspozicion kontraŭ malŝparo kaj konservativismo. Iuj desegnas vor-

tojn starante sur ŝtupetaroj, aliaj rapide skribas sin klinante super tabloj. Riĉenhava estas la ekspozicio, kaj ĝin vizitas multaj kamparanoj. Amaso da homoj ridas starante ĉirkaŭ karikaturo sur kiu pentriĝas homo aĉetanta kultan papermonon en la livera kooperativo de Zhuanqiao-urbeto, kaj skribiĝas la jena satiro:

*Kooperativo en nomo,
Ĝi superŝtacaĵojn liveras.
Malŝpar' de popola la mono—
Ĉu tion ĉi fari ni devas?*

La pentristoj ne nur lernas laboradon de la kamparanoj, sed ankaŭ kontraŭbatalas kune kun progresemaj kamparanoj malprogresajn agojn. Ili estas ŝanĝantaĵ sian koncepton pri beleco kaj pri la vivo. Vere, ilia surkampa laborado mem formis plej vivan socialisman bildon de printempa plugado.

Esperantigis LIAO ZHIGEN

"Malŝarĝu tiamaniere".


de He You-zhi



Pentristoj en kamparo

de Wang Zhung-qing





ENIRINTE la Pekinan Perdajejon, mi sentas kvazaŭ mi alvenus en ĉiovendejo. Ĉe la muroj staras du vitrinoj: en unu prezentiga diversformaj valizetoj kaj en la alia pendas pli ol cent okulvitroj. Meze de la ĉambro, staras kelkaj bretaroj, ankaŭ plenplene ŝarĝataj per pako da diverskoloraj lantrikitajoj, veluraj vestaĵoj, ŝaloj, gantoj. El iu vitrino aŭdiĝas delikata tiktakado — tie sin trovas pli ol 400 irantaj manhorloĝoj. En alia vitrino

metiĝas pli ol 6 mil fontoplumoj de pli ol dek fabrikmarkoj. Kaj la elmontraĵoj en la ĉambro estas nur malgranda parto de la alsenditaj trovitaĵoj atendantaj siajn mastrojn, kiujn la laborantoj de la Perdajejo jam klasifikis en 40 ĝeneralajn specojn. Kalkulate laŭ la perdintoj, ili apartenas al ĉirkaŭ 30,000 malzorgemuloj.

De kie oni kolektis tiel multajn perdajojn? La respondo estas ke ili estas alportitaj de miloj da

KURANTAJ AFEROJ

FOSILIO DE LONGHARA RINOCERO

Antaŭ nelonge en la okcidenta parto de Heilongjiang-provinco oni trovis raran fosilion de longhara rinocero. Ĝi longas 3.4m. kaj altas 1.95m. Tiu ĉi besto vivis antaŭ pli ol 20,000 jaroj kun longaj haroj sur la korpo kaj kornoj sur la kapo. Laŭ ekspertizo de arkeologo Pei Wenzhong tiu ĉi fosilio de longhara rinocero estas la plej bone konservita en Ĉinio.

LITERATURA KONKURADO DE POPOLAMASO

En la Pekina Kultura Palaco de Laboristoj okazis en marto literatura konkuro de laboristoj, kamparanoj kaj studentoj. Entute 42 literaturaj programeroj estis prezentitaj. Ĉiu el la programeroj prenas mallongajn kaj akrajn literaturajn formojn, ekzemple

ritman rakonton, informan drameton, humoran konversacion k.a. Chen Yuebo, 59-jara maljunulo, kaj Fan Boqiang 63-jara, ambaŭ membroj de la agrikultura kooperativo Ruĝa Lumo kantis "Kanto ĉe la Konstruejo", akompanate de muzikiloj. Studentoj de Qinghua - universitato kantis ilian kolektivon verkon "Arioj ĉe Shisanling - akvokonservejo". La programeroj aŭ kantis la progresajn labormetodojn aŭ kritikis kaj priridis la konservativismon kaj malŝparemon.

BREDO DE PERLOKONKOJ

Hepu, apudmara gubernio de Guangdong-provinco, estas fama perloproduktejo jam de miloj da jaroj. Ĉar tie troviĝas golfo havanta multe da perlostroj. Sed antaŭe oni devis akiri perlojn el sovaĝ-perlokonkoj, tial la produkto ne estis certa. Nun oni alprenas sciencan metodon bredi ostrojn por laŭcele kreskigi perlojn. Speciala bredejo ĉe la maro

estas kreita. Espereble baldaŭ oni ricevos de ĝi plimulte da altvaloraj perloj.

NOVAJ FILMOJ

Ekde la 22a de marto komenciĝis sinsekve en 27 grandaj ĉinaj urboj la ekspozicio de novaj filmoj. Sume 22 interesaj filmoj el la pli ol 200 filmoj produktitaj en 1957 prezentigis en unu semajno. Duono el ili estas naturkolora. La temoj kaj stiloj estas diversaj. Inter la rakonto-filmoj troviĝis "Nokta Frosteco", priskribanta la gerilajn batalojn en Dabie-montaro, "Filo de Paŝtistoj" kaj "Fluto-blovado" pri la ŝanĝo de kampara vivo kaj la transformiĝo de la gejunuloj, "Kanto de Fenikso" temanta pri la liberiĝo de virinoj kaj riĉa je belaj kantoj. Krome estas multe da mallongaj kaj freŝaj sciencaj, dokumentaj, kaj pejzaĝaj filmoj, ekzemple, "La Okcidenta Lago", "Ĉinaj Porcelanoj", "Kiel la Ponto sur Yangzrivero Konstruiĝis" ktp.

ordinaraj homoj. Unue oni ilin portis al la diversaj strataj kaj publikejaj perdajejoj. Tiujn, kiujn neniu venis por repreni en dek tagoj, oni transportas al la centra perdajejo. Ordinara tribiciklito povas memkonscie alporti kelkcent jūanojn da bankbiletoj perditaj de la kliento al proksima policejo. Ordinara trama (aŭ aŭtobusa) konduktoro povas memkonscie alporti la perditajn oraĵojn al sia trama (aŭ aŭtobusa) kompanio. Elementlerneĵano povas transdoni fontplumon trovitan sur strato al deĵoranta onĉjo policano. Kaj ofte la trovintoj ne lasas noti sian nomon, ke al ili la perdintoj eĉ ne povas esprimi siajn dankojn.

La perdajejoj alportitaj el diversaj lokoj alportas al la laborantoj pezan taskon. Ekzemple, por ke la vestoj ne estu tinemorditaj, oni devas ilin ofte sunumi; por ke la manhorloĝoj ne rustiĝu, oni devas ilin streĉi ĉiutage; kaj iujn instrumentojn oni devas ofte purigi. Tamen ĉio ĉi tio estas ankoraŭ facile plenumbla, kaj la plej malfacila tasko estas trovi la mastron por ĉiu perdajejo.

Se la perdinto mem venas serĉi sian perdajejon, la problemo kompreneble estas facile solvebla, alie, la laborantoj de la Perdajejo povas nur laŭ la tempo kaj loko de trovo kaj la karakterizaĵo de la perdajejo, pene serĉadi la postsignon de la perdinto paŝon post paŝo. Kaj pro tio, en la Perdajejo oni povas rimarki ke iuj laborantoj jam raŭkiĝis de telefonado dum aliaj kun kuntirataj brovoj klopodas eldiveni kie loĝas la perdinto. Kaj pro tio, oni ankaŭ povas vidi kiel ĝojaj ili estas, kiam ili sukcesis redoni iun perdajejon al la perdinto.

Ekzemple, en aprilo de la pasinta jaro, iu provinca kolportisto Wang Lin perdis ĉe Qianmen-pordego sian sakon, en kiu sintrovas pli ol 200 jūanoj da bankbiletoj. Estas facile imageble kiel ĉagrenita estis la perdinto. Tamen ĝuste en la sama tempo, ankaŭ iu perdajeja laboranto Ma Rong-xiu cerbumadis senmove sidante en la oficejo. Malferminte la monsakon li trovis en ĝi nur pakojn de etsumaj bankbiletoj. La sperto en ĉi tia laboro instruis lin ke la perdinto de tiu ĉi monsako estas nepre

provinca kolportisto. Li do maltrankvile demandis sin: "Por provincano ĵus veninta en la urbon ja ĉio estas fremda, kion fari se li ne scias kiel serĉi sian monsakon? Kaj kion fari se li jam perdis memfidon kaj malespere forlasis Pekinon? Kiamaniere oni povas trovi tiun perdinton?" Finfine estas feliĉe ke la perdinto alvenis al la Perdajejo kaj sekve Ma Rong-xiu ankaŭ liberiĝis de la pezega ŝarĝo.

Ankaŭ multaj perdintoj jam rericevis siajn perdajejojn senditajn de la Perdajejo antaŭ sia ekserĉo. La epizodo de projektistino Miao Yan-xiu de la Pekina Projekta Institucio de Fundamenta Ĥemio estas unu el tiaj ekzemploj. La projektistino perdis sian ĵus ricevitan salajr-saketon. Ĉar sur ĝi skribiĝis nur ŝiaj profesio kaj nomo, sed ne la nomo de la institucio, do ricevinte la saketon, la laborantoj de la Perdajejo povis nur laŭvice aliri al ĉiu el la industriaj institucioj en la distrikto por informiĝi. Finfine oni trovis la adreson de la projektistino kaj kiam ŝi ricevis sian salajr-saketon, ŝi tre miris kaj kortuŝe laŭdis la laboron de la Pekina Perdajejo.

ELĈINIGIS ZEKUN





Pierrot vizitas S-ron Wang

ANTAŬ nelonge ni filmis naturkoloran infan-filmon "La Kajto" kune kun francaj amikoj.

La filmo rakontas pri franca knabo Pierrot, kiu trovis kajton kun surpentrita figuro de Sun Wukong, la fea simio el ĉina mitologio, kaj surskribita letero kun fremdaj kaj strangaj skribajoj. Pierrot portis la leteron al Sinjoro Wang, ĉina komercisto de kuriozaĵoj en Parizo. Sinjoro Wang legis por li tiun kortuŝan leteron, skribitan de iu ĉina knabo Song Xiao-qing, kiu komisiis la kajton serĉi por li amikon. La arda aspiro al amikeco de Song Xiao-qing multe tuŝis la koron de

Ouyang Hong-ying:

Filmado kun

Pierrot, kaj la lasta deziregis sendi respondon al li. Sed malfeliĉe la adreso de Song Xiao-qing, kaŝita en la kajtokvasto estis forrabita de la impertinenta Bibert. Tio kaŭzis al Pierrot grandan ĉagrenon.

En la nokto Pierrot sonĝis, ke Sun Wukong venas mirakle el la kajto. Li promesis al Pierrot, ke li sendos lin al Ĉinio por serĉi Song Xiao-qing. Kaj Sun Wukong, simple deŝiris haron de sia korpo kaj ĝin ekblovis. La haro tuj fariĝis mola blanka nuboj, kiu levis la liton de Pierrot, kaj ĝin sendis al Pekino, la ĉefurbo de Ĉinio.

Alveninte Pekinon, Pierrot renkontis multajn ĉinajn amiketojn, kiuj fervore helpis lin por serĉi ĉie Song Xiao-qing, nur la malica Bibert lin ĉiel malhelpis. Tamen la brava Pierrot fine trovis Song Xiao-qing kaj estis akceptata kun varma amikeco.

Vekita de franjo Nicole li ankoraŭ kriis: "Dankon, Sun Wukong! . . ."

Vekiĝinte el la sonĝo Pierrot gaje rakontis al siaj infanamikoj, kion li travivis en la sonĝo. La malicema Bibert eksanĝis sian sintenon kompreneble la signifon de la kajtokvasto. Li skribis leteron

Zang Ke-jia :

Robeson Estas en Usono

—Je la 60-a jara datreveno de lia naskiĝtago—

Robeson estas en Uson'.
Tra l' tuta mondo ŝvebas
Lia kantoson'.

Robeson estas en Uson'.
Iuj timas lian kanton kiel fajron,
Persekutoj sieĝas ĉirkaŭ lia person'.

La Robesona kantoson'
Al la faŝistoj estas ja "eksplodo",
Sed varmfluo en pacama popolkor'.

La Robesona kantoson'
Ne rompebla per baston' kaj ŝtono,
Estas kuraĝiga korno al la homa kor'.

Tra l' tuta mond' kiel blankkolomb' lia kant'
Flugas al Soveta Kazahio
Kaj ankaŭ al la nova Ĉinland'.

Al Robeson doloras la kor',
Sed li ankaŭ sentas grandan ĝojon,
Sciante ja por kio kaj por kiuj lia kantoson'.

Robeson estas en Uson'.
Pli multas ol la steloj sur la ĉielo
Amikoj liaj en la tuta mond'.

Trad. I. U.

Francaj Amikoj

al Song Xiao-qing kaj invitis ĉiujn amikojn ĝin subskribi por sendi al Song Xiao-qing en Ĉinio.

Pierrot kaj Bibert repaciĝis. Man-en-mane ili serioze metis la leteron por Song Xiao-qing en poŝtkeston.

* * *

Inter la francaj amikoj, kiuj venis al Ĉinio por la filmado troviĝis S-ro Roger, eminenta filmreĝisoro, unu el la 4 famaj filmistoj S-ro Alkan, patrino de sceneja sekretario S-rino Vita, lerta filmredaktistino Fraŭlino Marinette kaj kopiofaristo Pierre, kaj infanaktoroj Gérard kaj Rozenberg. Ili estas ĉiuj seriozaj en laboro kaj same kiel ni, homoj sinceraj, malkaŝemaj kaj pacamaj, amikecaj kaj bonkoraj. Tial ni agrable kunlaboris dum la tuta filmado. Post la alveno al Pekino ili tuj vizitis la delonge sopiratajn pejzaĝojn kaj famajn lokojn en la ĉefurbo. Foje S-ro Birry vizitis la Ĉielan Altaron kun kelkaj amikoj. Survoje li tiel absorbiĝis de la ĉirkaŭaĵoj, ke li perdis sian notlibron. Nur kiam li eniris la pordon de la altaro, li tion rimarkis sed neniu sciis kie la libreto falis. Ĝuste tiam, iu nekonata ĉino haste enbiciklis.

“Ĉu ĝi estas via? . . .” demandis la ĉino ŝvitanta desaltinte de la biciklo kaj montrante la malgrandan notlibron al ili. Birry tuj rekonis sian notlibron. Tio estis vere ekster lia atendo. Li tute kortuŝiĝis, ripetante emocie la ĵus lernitajn vortojn: “Xiexie — xiexie (dankojn). . .”

Ne longe post komenciĝo de la filmado, informiĝinte pri la alveno kaj celo de la francaj amiketoj, Pekinaj jun-pioniroj estis multe entuziasmitaj kaj tuj aranĝis por ili amuzan vesperon en la Infana Palaco de Pekino por festi tiun amikan kunlaboron.

Tio okazis ĝuste en tago de plej streĉa laboro. Tamen la francaj infanaktoroj ne volante longe atendigi la pli ol du cent ĉinajn amiketojn akurate venis al la kunveno tuj post la laboro eĉ sen vespermanĝo. Vigleco kaj harmonio karakterizis la vesperon. La geknaboj ĉinaj kaj francaj kune kantis ĝojplene. La tuta salono satoriĝis de sincera amikeco de la geknaboj.

La pioniroj en Pekino prezentis al la francaj infanaktoroj donacojn: serio da gramofondiskoj de “La Lasta Leciono” de Dautet, bela kajto kun bildo de fenikso simbolanta pacon kaj feliĉon, albumoj kun belaj ĉinaj poŝtmarkoj. Kaj la francaj infanaktoroj ankaŭ donacis al siaj ĉinaj amikoj altvaloran donacon: telero kun kolombo de Picasso.

La franca filmoreĝisoro Roger profunde kortuŝiĝis de la amika sceno. Li diris:

“ . . . Ĝi estas vespero agrabla kaj neforgesebla. Ĝi neniam forviŝiĝos el mia memoro, precipe la kanto de la aminda knabino. . . .”

Ja tre bela kaj neforgesebla estas la kanto:

“Vi venis el Parizo fora,
Por serĉi la pac-amikecon;
La samon ni deziras kore,
Akceptos la pacan promeson.
Vi serĉas Song Xiao-qing nur iun,
Sed en Ĉinio
Vi trovos Song Xiao-qing ja ĉiun.

Jen finiĝas la filmado en Ĉinio. La 14 francaj amikoj jam devis reiri al sia patrolando. Kiam ili estis forlasonta Pekinon, ili esprimis bedaŭron adiaŭdiri al la lando en kiu ili trovis sinceran kaj amikan akcepton. Unu el ili diris emocie:

“Mi jam kutimiĝas al Pekino. La unua afero, kiun mi faros post mia reveno al la hejmlando estos aliĝo al la Franca-Ĉina Amikeca Asocio, ĉar mi tre ege bezonas daŭre kaj detale informiĝi pri la vera stato de via lando. . . .”


Antaŭ suriro al la forflugonta aeroplano, de multaj el ili la okuloj ekvualiĝis de larmo, kelkaj eĉ ne povis ilin reteni. Neniu volis diri la vorton “adieu”, sed ili varme premis niajn manojn kiel kutime post ĉiutaga laboro, plurfoje ripetinte: “Au demain (ĝis morgaŭ)!” “Au revoir (ĝis revido)!”


Jes, ni nin revidos.

Elĉinigiĝis HONFAN

Sceno filmata

Foto de Ye Hua





Mateno ĉe la Pordego de l' Ĉiela Trankvileco

Lignogravuraĵo de Gu Yuan

Aleksej Surkov :

*En la Placo de l' Ĉiela Trankvileco **

*En centra placo de l' Ĉiela Trankvilec'
sub vento tra la stratoj kaj bulvaroj
sonoras luma, elorkestra bel-sonec'
kaj silk' riveras de la ruĝ-standardoj.*

*En centra placo de l' Ĉiela Trankvilec'
kun klara en okuloj lukt-rebrilo
defilas defendantoj de la feliĉec',
de paco, de laboro kaj trankvilo.*

*En centra placo de l' Ĉiela Trankvilec'
sin plektas en muziko nova kanto:
alvenas ordinaraj homoj kun gajec'—
la konstruantoj de Ĉinio granda.*

*En centra placo de l' Ĉiela Trankvilec'
ho, kia ĝoj' en morgaŭ-konstruuloj!
Per bild' de drakoj kaj leonoj laŭ la dec'
la patrojn salutadas gejunuloj.*

*Kaj super placo de l' Ĉiela Trankvilec'
oktobre brilas firmament' oblikva.
Sur ĉi-planedo englorigis la junec'
feliĉon teran de l' popol' antikva.*

**Tradukis el rusa: Canko
MURGIN (Bulgarujo)**

* La placo de l' Ĉiela Trankvileco (Tian'anmen)
estas la loko de popolaj solenoj en Pekino, Ĉinio.

KURANTAJ AFEROJ

EKSPOZICIO DE SKRIBARTO

La skribartoj en Ĉinio kaj Japanio estas parencaj. Lastjare en Tokio, oni aranĝis ekspozicion de ĉina skribarto. Ĝi interesis multajn japanojn skriboamantajn. Nun tiu ekspozicio ankoraŭ mi-

gras al aliaj japanaj urboj. Ĉe la fino de februaro en Pekino malfermiĝis ankaŭ ekspozicio de japana skribarto. La skriboj de Bundo Ŝunkai, Cuĉia Cikuu, Hirocu Unzen k.a. estas multe laŭdataj de ĉinaj kaligrafistoj. Nun post trisemajna ekspozicio en Pekino la materialoj estas trans-

lokita al aliaj grandaj urboj en Ĉinio.

PREZOMALTIĜO

Ekde la 20a de marto la prezoj de kelkaj varspecoj denove malaltiĝis, laŭ decido de la Varprez-kontrola Komitato. Tiu ĉi decido validas por 24 specoj da medikamentoj, 19 specoj da radioapa-

FIŜLAGO EN DEZERTO

DUM la lastjara esplorado, oni trovis, ke Hongjiannao-lago de Shenmu-gubernio, Shānxi-provinco, riĉas je freŝ-akvaj fiŝoj. Ĉiufoje kiam ventegas, ofte fiŝoj kelkajn ĝin-ojn pezaj elsaltas sur-borden. Loĝantoj tie diris, ke en la lago estas karpoj pezantaj je kelkcent ĝin-oj, kaj la produkta kvanto estas granda.

Sur la bordoj vivas multaj sovaĝaj anasoj. Ĉiujare, dum la ovoprodukta periodo de sovaĝaj anasoj, sufiĉas mallonga irado laŭ la bordo por ke oni kolektu korbegon da freŝaj kaj bongustaj ovoĵoj de sovaĝaj anasoj.

La akvoprodukta fako de Shānxi-provinco jam projektis por ekspluati la fiŝoriĉan lagon.

TEKSEBLA SOVAĜA ARORUTO

ARORUTO estas sovaĝa vegetaĵo kreskanta vaste sur la montoj kaj ebenaĵoj, vojflankoj kaj riveraj bordoj en Pingli-gubernio en la suda parto de Shānxi-provinco. Ĝiaj fibroj estas ŝpineblaj, la tolo teksita el ĝia ŝpinajo estas fortika kaj la originala koloro de la fibro estas helflava kaj bela. Laŭ nedetala esploro ĉiujare produktiĝas 25,000,000 ĝin-oj da aroruto en Pingli-gubernio, tiu kvanto

sufiĉas por prepari 1,500,000 ĝin-ojn da fibro, egala al kotono produktita de 300,000 mu-oj da tero.

Baldaŭ oni konstruos ŝpinan kaj teksan fabrikon de aroruto en Pingli-gubernio.

INSEKTA SUKERO

ĈE Zhangjiapan- kaj Liuguiwan-vilaĝoj en Jingbian-gubernio, Shānxi-provinco, oni utiligas sekrecion de ia insekto por fabriki sukeron. Loĝantoj tie nomas tiun sukeron insekta sukero. La gusto kaj koloro de la insekta sukero similas al tiuj de la ordinaraĵoj.

La malgrandaj insektoj, sekreciantaj sukeran sukron, vivas sur saliko. Ili nomiĝas *youhan*-insektoj. Ilia grandeco egalas al tiu de fazeolo kaj ilia korpo estas nigreruĝa. Ili multiĝas ĉiujare en julio kaj aŭgusto, sin loĝigas sur salikaj branĉoj kaj folioj kaj restadas sur la samaj lokoj. Sur la branĉoj sub la insektoj iom post iom akumuliĝas ia blanka glua sekrecio, kiun la kamparanoj nomas fekajo de *youhan*-insekto, kiu taŭgas por fabriki sukron. Sub la salikoj, sur kiuj troviĝas plej multe da tiaj insektoj, la malsupren gutita gluaĵo ofte formas dikan tavolon sur la tero.

ESPERANTIGIS AŬRORO

ratoj, ĉiuspecaj vekhorloĝoj, kaj neontuboj. La prezoj de medikamentoj, inkluzive multeuzatajn medikamentojn kiel penicilino, malaltiĝis je 8% ĝis 60%. Tiuj de radioaparatoj, vekhorloĝoj ktp. malaltiĝis je pli ol 20%.

LA UNUA APARATO FOR TELEVIDA CENTRO

La unua aparato por televida centro estas fabrikita en Ĉinio. Je la 17a de marto oni bone sukcesis dissendi per la aparato la prezentadon de la Centra Muzika Grupo. Preparado por fabriki tiun aparaton komenciĝis en lasta oktobro per la kunlaboro de sciencaj institutoj kaj fabriko. En mallonga tempo ili venkis multajn malfacilojn kaj sukcesis en la fabrikado. Nun ili ankoraŭ entreprenas la fabrikadon de ceteraj televidaj aparatoj.


NOVAJ VERKOJ DE VETERANAĴ DRAMVERKISTOJ

En la alta tajdo de socialisma konstruado, multaj verkistoj ricevis grandan instigon por verkado. Ankaŭ la veteranaĵ verkistoj, kiuj jam longe nenion verkis pro troa okupateco de aliaj laboroj, nun reprenas sian plumon. Tian Han, fama dramverkisto, anoncis, ke li decidis verki 10 dramojn en 1958. La unua dramo "Guan Hanqing", pri la vivo kaj verkoj de tiu dramisto en Yuan-dinastio (1279-1368 p.K.) jam estas verkata. Alia veterana dramverkisto Yang Han-sheng baldaŭ finos sian novan verkon "Tri Personoj" kiu priskribas tri specojn de intelektuloj. Lasttempe la famkonata kaj fekunda verkisto Lao She ĵus finis sian dramon "En la Tetrinkejo" pri la transformiĝo de 1898

ĝis la liberiĝo, kaj ĝi jam sursceniĝis.

JAPANA BALETGRUPO VARME AKCEPTITA

En marto ĉinaj artistoj kaj literaturistoj okazigis grandan kunvenon por bonvenigi la japanan baletgrupon, gvidatan de S-ro Simizu. Ĝin partoprenis multaj famaj ĉinaj literaturistoj, dancistinoj kaj muzikistoj. Tiu kunveno estas la interfluo de la koroj de ĉinaj kaj japanaj artistoj, kiel diris S-ro Simizu. Interesa estis tio, ke Fraŭlino Matsujama, kiu ludis la rolon de Blankhara Knabino (heroino de la vaste konata kaj amata ĉina opero) en la baletoj, renkontis en tiu ĉi kunveno ĉinajn aktorinojn, kiuj ludis la saman rolon en diversspecaj operoj.



RIĈA LANDO,

aŭ tri-foje en ĉiu jaro. Raraj industriaj plantoj kiel kafo, kaŭĉuko, marinsula koton, citronela herbo kaj sisalfibro, vaste plantiĝas en la regiono kaj ĝiaj famaj *shatian*-pampelmo, longano, ananaso, limono, oranĝo, citrono kc. vendiĝas tra la tuta lando.

Ĝi tre riĉas ankaŭ je subteraj mineraloj. Gravan lokon la regiono okupas inter manganhavaj regionoj, la duan lokon ĝi okupas en riĉeco de subtera stan-mineralo, kaj ankaŭ estas unu el la ĉefaj or-produktaj regionoj. Ĝi estas riĉa ankaŭ je karbo, fero, plumbo, zinko, volframo, petrolo, kvarcokristalo kc. En la vasta, arbara kaj monteta lando produktiĝas pli ol kvincent specoj da specialaj produktaĵoj kaj pli ol mil specoj da medikamentoj.

“Guangxi estas loko bona; ĉiu monto, trezordona. Nur laboru ni sindone, ni ja vivos ĉiam pli bone.” Multaj tiaj popolkantoj spegulas la decidemon kaj memfidon de la diversaj nacioj konstrui prosperan kaj feliĉan novan Guangxi.

Post pli-ol-okjara penega konstruado, la trajtoj de Guangxi jam tute ŝanĝiĝis. Greno kaj aliaj agrikulturaj produktaĵoj ĉiujare plimultiĝas kaj la vivo de la diversaj nacioj jam evidente pliboniĝis. Antaŭ la liberiĝo Guangxi apenaŭ havis modernan industrion, sed nuntempe ĝi havas 107 modernajn

LA Guangxi-a Aŭtonoma Regiono de Zhuang-nacio, fondiĝinta je la 5-a de marto, estas la tria minoritata aŭtonoma regiono en nia lando samranga kiel provinco. Tie ĉi loĝas 7,003,000 anoj de Zhuang-nacio, kiu estas unu el la plej multmembraj minoritatoj de Ĉinio. En la aŭtonoma regiono loĝas ankaŭ Han-, Yao-, Miao-, Tung-, Molao-, Maonan-, Gelao-, Hui-, Shuijia- kaj Lolo-nacioj. En la tuta regiono nombriĝas pli ol 19,000,000 loĝantoj.

La areo de la aŭtonoma regiono estas pli ol 215,000 kvadrataj kilometroj, plejparte en la subtropika regiono, kaj floroj kaj arboj verdas kaj prosperas tutjare en la meza kaj suda partoj. Bananoj ĉie abundas sur la pizangoj, sukerkanaj kampoj sin etendas unu apud alia kiel vasta maro. La tuta regiono havas pli ol 37,000,000 muojn da agro kaj la kamparanoj povas rikolti grenon du-

GOXU

Ji Ying

*En la pasinteco ni prikantis nur la amon,
Kvankam per la amo ne mildiĝis la mizero;
Eĉ kantfestoj tiaj ofte estis dispelitaj,
Ĉiam restis al ni absintaĵo de sufero!*

Sed hodiaŭ Goxu-n festas homaj svarmoj,
Ĝoje horas ankau' l' stepo kaj la valo:
Kombinante la laboron kun la amo,
Ni ĝuadas vivon en feliĉa maro.*

*Blanka nubo haltas ĉe l' montpinto
Por aŭskulti nian dolĉan kanton.
Flugu al Pekino, ho, vi, blanka nubo,
Por Zhuang-anoj korsalutu l' Prezidanton.*

Trad. I. U.

*Goxu (elp. koŝju) estas tradicia festo de Zhuang-nacio en printempo, dum kiu la




gejunuloj kunvenas por kantadi kaj trovi amaton aŭ amatinon.

ELA ESTONTECO

minojn kaj fabrikojn de kolormetaloj mangano kaj stano, elektro, maŝinfarado, aŭtoriparo, sukerprodukto kc. (inkluzive 21 gravaj rekonstruitaj unuoj), kaj la industria produktovalorado konsistigas 32.5 procentojn de la tuta industria kaj agrikultura produktovalorado de la tuta regiono. Ankaŭ fervoja kaj ŝosea komunikado, kulturo kaj eduko multe disvolviĝis.

Komence de lasta vintro, leviĝis en alta tajdo la movadoj de akvokonserva konstruado, sterko-kolektado, forstigado kaj neniigo de la "4 bestaĉoj" (t.e. muŝoj, moskitoj, musoj kaj paseroj). Oni komencis konstrui pli ol 120,000 grandajn kaj malgrandajn akvokonservajn konstruojn, kiuj sufiĉas por irigacii pli ol 12,000,000 muojn da tero, kaj tiu irigaciata areo superas la tutan areon irigaciatan per la akvokonservaj konstruoj faritaj en la pasintaj kelkmil jaroj. 50 gubernioj ĉijare baze neniigos trosekecon en siaj akvokampoj.

Esperantigis A. L.



Zhuang-nacia Festo

de Weng Qian-li

Trad. Laŭlum

Tri Popolkantoj de Zhuang-nacio

Kanto pri la Aŭtonoma Regiono

Ni povre nestadis sub mont' en kavaro.
Mizer' nin turmentis de jaro al jaro —
Neniam ekmildis al ni la sortbato,
Minacis tagnokte nur frosto, malsato.

Ektondras, kaj venas printempo serena,
El kavoj ni venas al lumo matena,
Saviĝo al ni — politik' kompartia.
Ekstaras ni minoritato nacia.

Jam reprezentantojn ni mem elektos;
Kaj proprajn laborojn ni mem direktos,
Ĉar nin ekfavoras feliĉo burĝona —
Fondiĝos tuj Zhuang-region' Aŭtonoma.

Ekfloras la Koro Tuj Kiel Ombrello

La arboj plantitaj sur tutaj la montoj
Plenplenas de fruktoj arĝentaj kaj oraj,
La fruktoj luliĝas en mildaj ventondoj,
Kaj homajn vizaĝojn priombas belfloraj.

Tra l' pord' ekrigardas mi al la ĉielo,
Ekfloras la koro tuj kiel ombrelo;
Jam nuboj densnigraj de l' ĉiel' fordegelis,
Feliĉon Mao la Prezidant' al liveris.

De Kara Pekino Alvenas la Kantsono

Sur mont' orienta jen ruĝas sun-duono.
De kie alflugas la kanto belatona?
Jen sur la arbego, funela megafono, —
De kara Pekino alvenas la kantsono.

Patrino kun Filo Serĉas la Sunon

—Legendo de Zhuang-nacio kolektita de Bu-ying—

ANTAŬE en pratempe ni, Zhuang-oj ja sciis ke en la ĉielo estas la suno, kiu leviĝas el la oriento kaj de kiu dependas la vivado kaj generado de ĉiuj estaĵoj. Sed la suno tiam ne jetis siajn radiojn super nin!

En la tago, kiel en la malluma nokto ne estis sunlumo, nek varmo ĉe mi en tiu tempo. Mallumo kaj malvarmo regis la landon, ĉie vagis tigroj, leopardoj kaj lupoj, de kiuj estis mortigitaj sen-nombraj homoj. Oni ne povis kontraŭbatali la rabaĵn bestojn en mallumo. Necesis sendi iun por peti helpon de la suno.



Lignogravuraĵo de Huang Yung-yu

Ĉe elektado de vizitonto al la suno, ĉiuj interdisputis kaj deziris mem iri al la suno.

Unue stariĝis maljuna avo pli-ol-sesdekjara: “Lasu min iri! ĉar mi estas maljuna, laboras malmulte sur la kampo, sed mi povas marŝi ankoraŭ kaj kapablas plenumi la taskon.”

“Ne! lasu min iri”, kontraŭdiris iu fortika mezaĝulo sin levante el la homamaso. “Ĉar mi havas fortikan korpon, povas ĉiutage marŝi 160 liojn, kaj rapide atingos la sunon.”

Kaj multaj fortikaj gejunuloj brue ekpledis por si kaj konkuris per siaj favoraj kondiĉoj. Ĉiu garantiis eĉ rapidan iron kaj revenon.

“Ne!” kriis akra voĉe knabo ĉirkaŭ dekjara: “Mi devas diri, ke vi, maljuna avo, onkloj, onklinoj, pliaĝaj fratoj kaj fratinoj, ĉiuj ne taŭgas por iri. Ĉar longega distanco estas antaŭ ni ĝis la suno, oni ne povos atingi la sunon en 40 aŭ 50 jaroj, la vojaĝo eble bezonos 80 ĝis 90 jarojn. Mia aĝo estas malgranda, do nur mia iro povas garantii la atingon.”

Kiam li finis la parolon, ĉiuj ekfaris siajn rimarkojn:

“La knabo diris prave.”

“Vere nur li taŭgas por tio.”

“Aŭskultu al mi, aŭskultu por momento!” kriis svingante sian manon graveda virino ĉirkaŭ dudekjara, nomata Male.

Kaj ŝi daŭrigis kiam ĉiuj denove kvietiĝis: “La knabo diris prave, la suno estas tre malproksima de ni. Eble oni ne povos alveni al la suno en 80 ĝis 90 jaroj, kaj cetere okdek- aŭ naŭdek-jarulo iros malfacile. Prefere mi iru. Ĉar unue, mia korpo estas fortika, min ne malhelpos altaj kaj krutaj montoj, nek timigos venenaj serpentoj kaj rabaj bestoj; due, mi gravedas, mian vojaĝon al la suno povos daŭrigi mia filo.”

Ĉiuj konsentis ŝian opinion kaj decidis sendi ŝin al la suno, petante ke ŝi signalu al la hejmlando per bruligo tuj post la atingo al la suno.

Ŝi komencis la vojaĝon. Ŝi iris rekte al la oriento. Kaj post ok monatoj ŝi naskis fortikan filon kaj daŭrigis la iradon kun sia infano. Ŝi marŝis kaj marŝis, marŝadis 70 jarojn, kaj ŝiaj piedoj peziĝis kaj estis apenaŭ leveblaj. Tiam ŝi haltis en domo de iu kamparano ordonante sian filon daŭrigi la vojaĝon al la suno.

Dum la 70 jaroj, ŝi kaj ŝia filo transgrimpis sennombrajn grandajn montojn kaj transpasis sennombrajn riveregojn. Ili renkontis ankaŭ sennombrajn venenajn serpentojn kaj rabajn bestojn. Ili travivis nekalkuleblajn malfacilaĵojn kaj suferojn. Sennombrajn fojojn ili trafis en vivdanĝeron. Sed ili ĉion fine trapasis. Ĉar unue, ili havis fortikan korpon por venki la obstaklojn kaj due, ilin helpis ĉiuj, aŭdante pri ilia celo de vizito al la suno, ĉu per manĝigo aŭ vestigo, ĉu per vojgvidado aŭ transŝipado.

Kaj hejme, depost la foriro de Male, oni ĉiutage rigardadis al la oriento, atendante la fajrsignalon. Pasis dek jaroj. Pasis 20 jaroj. Oni nenion vidis. Pasis 30, 40. . . . 70 jaroj, ili ankoraŭ nenion vidis. Ĉio restis sama kiel antaŭe. Estis nek sunlumo, nek varmo. Mallume kaj malvarme, ĉie estis tigroj, leopardoj kaj lupoj.

Oni devis konjekti ke ŝi jam mortis survoje. Oni povis nenion esperi.

Post ankoraŭ unu tago forpasos la centa jaro. Ja kiu atendis ke ĝuste en ĉi tiu tago, momenton antaŭ la sunleviĝo, en la oriento ekbrulis fajrego ruĝe lumiganta duonon de la firmamento. Kaj alian momenton leviĝis ruĝa, brila suno. Ĝi hele brilis super nian landon de Zhuang-nacio. Kaj la montoj kaj riveroj rebrilis per oraj radioj. Tiuj tigroj, leopardoj kaj lupoj, kiuj tiranis de miloj da jaroj, de tiam estis mortigitaj de ni unu post alia.

Por rememorigi Male kaj ŝian filon, ni, laborantaj popolanoj de Zhuang-nacio ĉiumatene, je ekruĝiĝo de la oriento iras laboradi sur la kampoj ĝis vespero, kiam en la okcidento pendiĝas ruĝa kurteno.

Esperantigis L. Z. G.



Lernado de Zhuang-a Lingvo

Lignogravuraĵo de Muo Shi-guang



Ilustraĵo de Li Lang

Feriaj Tagoj en la Hejmvilaĝo

(Tradukita el la taglibro de gimnaziano Wang Gui-qin
kaj ilustrita de An Lin)

La 5a de Aŭgusto, 1957. Lundo

MIA obstineco montriĝas ĉiuokaze. Mi ne aŭskultas ajnan admonon. Kion mi jam decidis, tion mi neniam ŝanĝos! Mi ne atendos ĝis kiam fraĉjo kaj bofranco ricevos siajn salajrojn por kunporti monon al la hejmo; nek pluvo nek koto povas min reteni; mi rifuzis ilian bonvolemon havigi al mi voj-kamaradon. Mi decidis ekveturi hejmvilaĝon je la unua ptm.

Estas tre feliĉe, ke en somero ankoraŭ funkcias aŭtobusoj por Fuping.

Fluge kuradis la aŭtobuso en milda vento sudorienta, kaj mi sentis agrablan malvarmeton en la koro. Jen estas antaŭsigno de ekpluvo.

Mi ja devas danki la Partion kaj la Registaron, ke mi povas atingi la hejmon per aŭtobuso en unu tago, eviti ĝenan tranokton survoje kaj tempon ŝpari. Kiu ja ekpensis antaŭe pri konstruigo de aŭtovojo por nia montregiono? Kiu ja sciis en la pasinteco inter la montaroj, kia aspektas la aŭto?

Ĉe Wangkuai-urbeto, mi ekveturis per ĉeval-ĉaro, kiu sin trenadis pli malrapide ol piedirantoj! Mi deziregis efektive tuj atingi la hejmon per unu paŝo!

La ĉeval-ĉaro moviĝis malrapidege kaj tio havigis al mi ŝancon pririgardi la apudvojn grenplantojn.

La printempaj maizplantoj jam altas pli ol homo. Iliaj franĝoj svingiĝas fiere en la vento. La maizospikoj dikaj kiel homa brako kaj longaj ĉirkaŭ unu futon estas grajniĝantaj. Ho, vidu la malfruajn maizplantojn, kvankam malaltaj, tamen ili ĉiuj jam havas po du spikoj!

Unuj apud aliaj sternaĝas bunte oraj kaj verdaj grenkampoj, kies grenspikoj peze sinbalancadas en vento kaj tavolon post tavolo oriĝis la grajnoj de la pinto tra la tuta spiko. Riĉa rikolto jam sin prezentas antaŭ miaj okuloj!

En la rizkampoj, la smeraldaj rizplantoj jam elpuŝis abrikot-flavajn spikojn. Ili disfloras kaj komencas grajnigi en plena prospero. De tempo al tempo venteto alblovas aromon de rizfloroj.

En la valo: daktilarboj amasiĝas en grandaj vic-aroj, kun verdaj fruktoj arope pendantaj de la branĉoj, kiuj kliniĝas sub la kvazaŭ ne eltenebla ŝarĝo. Estu firmaj!

Ĉion ĉi vidante mi sentas la koron ŝvelanta de ĝojo, estas vere ke la koro disfloras plenforte. Estu dankata la Partio! kantata la kooperigo!

Elĉariĝinte ĉe Xizhuang-vilaĝo, mi devis "ekveturi per aŭtomobilo n-ro 11" (t. e. per la piedoj. Noto de l' trad.) al la hejmo. Tio ne estas malfacila por mi, ĉar mi jam eltrejniĝis, des pli ke mi sopiregis tuj revidi panjon!

Sed pli profundiĝinte en la montaron, mi trovis, ke la vidaĵoj iom aliiĝas: Pro malsufiĉo de pluvo, la milio, arakiso. . . en la sekaj kampoj velkiĝas kvazaŭ bruligitaj. Jen estas plago natura!

Kiam ankaŭ ni scipovos artefari pluvon? Mi revis: Kiel bone estus, se ni povus komandi venton kaj pluvon! Tiam ĉiujare ni akirus riĉan rikolton, kaj la ŝtato abundecon kaj la popolo feliĉan vivon!

Dume, densaj nigraj nubegoj ruliĝis en la ĉielo. Momenton poste, tondregoj ekskuadis la teron kaj ĉielon. Ne ekpluvu ĝis mi atingos la hejmon!

Plenŝarĝite de pakajoj, kiujn mi portis surdorse, surbrake kaj enmane, mi antaŭen rapidis grand-paŝe. Mi kutimas iri rapide, kaj nun marŝadis eĉ fluge. Ĉe Shangzhuang-vilaĝo, mi pasis preter blankhara maljunulino sidanta sur muelŝtono kiu invitis min afable vidante mian ŝvitadon sur la vizaĝo: "Sidiĝu, knabino, kaj iom ripozu. Venu" Tion dirante ŝi proponis al mi sian junk-sidkusenon. Mi danke rifuzis. Se mi ne timus, ke mi ne atingos la hejmon, mi certe sidus por momento. La loĝantoj de Fuping-gubernio estas tiel gastamaj, ke en ĉiu ajn vilaĝo kaj ĉe ĉiu ajn renkontato vi certe estas traktata kiel proksimulo. Mi memoras, ke foje mi hejmeniris okaze de Novjara Festo, kaj ĝin trapasis ĉe fremda familio en Yulinggou-vilaĝo. Oni min traktis kvazaŭ mi estus ilia familiano.

Ekpluvegis. Dikaj pluveroj frapadis mian vizaĝon. Tondroj unu sekvis la alian. Mi ektermis ekstervole. Mezvoje troviĝis nenia vilaĝo

ĉu antaŭe ĉu malantaŭe. Kion fari se ekestos superakvego? Miaj paŝoj plirapidiĝis. Ĉe la penso, ke baldaŭ mi revidos panjon (ŝi certe estas min atendanta), ĝojo min superregis. Denove mi rigardis tiujn velkartajn grenplantaĵojn sur la kampoj. Jen ĝissate ili sorbsuĉis la pluvakvon, kvazaŭ reakiris vivenergion kaj refreŝiĝis. Mi gustumis la pluvakvon kaj trovis ke ĝi estas dolĉa. Nu, ne gravas mia malsekiĝo, se nur la grenplantoj kreskos bone, kio ja estas plej grava. Ho, falu, faladu pluvego ĝis sufiĉo!

La 6a de Aŭgusto. Mardo

“**K**AJ vivi kaj lerni, ĝis la vivofino, ja okdekjarulon atendas lertkulmino,” diras la proverbo. Ĉiu homo vivante devas lerni ĉiutage, alie li postiĝos. Mi opinias, ke ekster sia propra profesio, oni devas lerni iom pri ĉio alia precipe dom-mastrumado. Ekzemple, ĉu ne estas absurde, se virino ne scias manipuli kudrilon? Ĉu do



Nu, ne gravas mia malsekiĝo, se nur la grenplantoj kreskos bone . . .

vivi ĉiam dependante de tajloro? Ĉio, kion oni ne scipovas, ja indas lerni kaj la ellerno rekompencos per avantaĝo. Kaj por vivi bone, oni devas aranĝi la vivon, ke ĝi estu en bona ordo kaj riĉa je enhavo kaj koloroj. Laŭ mia opinion, la vivo de tiu kiu havas multflankajn interesojn, estas riĉenhava, kaj de tiu, kiu havas abundajn sciojn (diversflankajn) kaj scias mastri la vivon, estas multkolora.

Ĉifoje mi portis hejmen nur unu pantalonon, kaj estas necese, ke mi havu alian por ŝanĝado. Kion fari? Ja ne troviĝas tajlorejo en la kamparo. Do, faru mem propramane! Ŝajne la plej malfacila parto por mi estas la eltondado, kaj mi elpensis metodon jenan: eltondi laŭ alia pantalonon. Kudradon mi ne multe lernis. Sed nenio estas nun nebla por mi, ĉar mi havas sufiĉe da laborfervoro.

Alprenante pantalonon kiel ŝablonon, mi tuj komencis eltondodon, eltondinte tuj ekkudris, kaj post duontago mi jam pretiĝis la pantalonon. La suno ankoraŭ ne subiris, kiam mi ĝin surmetis. Aliaj min laŭdis dirante, ke mi kudris tiel bone, ke ĝi estas vera pantalonon uniforma. Panjo diris: “Blovos ventego!” Tio estas kritiko pri mia maldelikateco en la laboro, tamen ĝi entenas ankaŭ laŭdon, ke mi elfaris ĝin rapide.

Kiam la unuan fojon mi surmetis pantalonon mem faritan, mi sentis ĝojegon en la koro!

Se nur ni penas kaj cerbumas, ni povas sukcesi en ĉio ajn, kion ni faras. Ĝui la laborfrukton de propraj manoj estas senkompara ĝojo.

La 7a de Aŭgusto. Merkredo

LA kunligo de laboroj korpa kaj cerba estas postulo de la Partio. Kiam ni estis en la lernejo, ofte ni iris speciale al la antaŭurbaj agrikulturaj kooperativoj por fizika laboro. Kiel bona ŝanco estas por mi, nun vivi mem en agrikultura kooperativo!

Mi deziregas labori surkampe kune kun la terkulturistoj, sed mi alvenis tro malfrue, jam ne estas multe por fari sur la kampoj.

Nelonge post la tagmanĝo, mi ekaŭdis ke la kooperativanoj iros konstrui digojn. Mi tuj kuris al Ĝinjo por inviti ŝin iri posttagmeze kune kun mi por partopreni la konstruadon. Ŝiaj patrino kaj onklo hezitis konsenti. “Malofte vi hejmen revenas,” diris ŝia patrino. “Reveninte, ĉu vi ne devas iom ripozi hejme aŭ iom kudri kaj legi? Ekstere la suno bruligas, estas neelteneble por vi.” “Jes ja!” aldonis konsente ŝia onklo. “Ĉu digokonstruado estas afero por virinoj? Ĉu estas ŝercaĵo vundi la manojn de ŝton-portado? Cetere, kiu

ja sendus vin por perlabori poentojn?” Tion aŭdinte mi tuj elkuris el la korto. Spite al ĉio, mi mem nepre iros!

Vespere, ĝuante malvarmeton sur sablejo, mi denove parolis kun Ĝinjo pri partopreno de kampaj laboroj. Ŝi ankoraŭ ŝanceliĝadis. Aŭdinte nian interparolon, sesa oĉjo alpaŝis kaj diris: “Ne iru, estas sufiĉe lacige, kaj ne multe da labor-poentojn vi akiros per via laboro.” Mi respondis: “Sesa oĉjo, mi ne timas laciĝon. Kaj krome, mi ne celas perlabori poentojn, mi volas nur labori kaj ŝviti.”

Hejmveninte mi konsiliĝis kun panjo kaj klarigis al ŝi kiel necesa estas por mi korpa laboro. Panjo subtenis mian opinion, kaj diris ĝoje: “Iru gustumi kia ĝi estas. Ne trolacigu vin, sed ankaŭ ne montru delikatecon.” Kaj ŝi paŭzetis, kvazaŭ ion ekmemorinte, min pririgardis de kapo ĝis piedoj kaj daŭrigis: “En laboro oni aspektu kiel laboranto. Demetu viajn silkan jaketon kaj pantalonon kaj surmetu decan laborvestaĵon, kaj tiam vi ne aspektos tiom mola.”

Akirinte la subtenon de panjo, mi tre ĝojis. Kun rideto kaj belaj imagoj mi dolĉe endormiĝis.

La 8a de Aŭgusto. Ĵaŭdo

SUR la blua ĉielo ne troviĝis eĉ haro da nubo, kaj la arda sunbrilo bakadis la teron kvazaŭ forno da inkandeska fajro. La hodiaŭa laboro estos ja duobla elprovado—de la laboro kaj de la suno!

Panjo sukcesis trovi, post traserĉado de la kestoj kaj ŝrankoj, paron da “mont-ŝuoj” kun malmolaj plandumoj, kiujn mia pliĝa fratino portis nur unu aŭ du fojojn, kaj mallongan sed tre larĝan pantalonon kiun mia juna frato portis hejme, kaj krome ŝi vestis min per kamparana bluzo. Jen mi jam fariĝis vera kampara knabino! Panjo okupiĝadis pri mia alivestado, kvazaŭ mi irus viziti parencon. Ŝi ordigis por mi la veston, detale min ekzamenis kaj diris: “Bone, nun jam dece aspektas!” Kiam mi faris kelkajn paŝojn, ŝi denove min haltigis: “Atendu, Qinjo!” Tion dirante ŝi eniris la ĉambron kaj elvenis kun duonnova pajlĉapelo, kiun ŝi metis sur mian kapon. Panjo min post-rigardis ĝis mi eniris la valon.

Ĝinjo ne venis, venis entute nur kvar virinoj: la pli ol kvindek-jara bofranjo la dua, la juna, forta kaj bela bofranjo la kvina, la diplomitino de supera elementa lernejo Luo Feng-lan kaj mi mem.

Kiam ni ĉiuj ripozis, bofranjo la kvina elprenis grandan ŝu-plandumon el sia poŝo kaj komencis ĝin kudre solidigi “pik-pike”. Bofranjo la dua kolektis hejtbranĉojn; Feng-lan falĉis herbojn por brutoj.

Ankaŭ el la viroj iuj herbojn ekfalĉis, sed la plejparto de ili babiladis.

Mi kolektis iom da hejtbranĉoj helpe al bofranjo la dua, kaj poste transprenis la falĉilon de Feng-lan kaj komencis falĉi fojnherbojn. Kliniĝinte mi kaptis herbojn per la maldekstra mano, kaj tranĉis per la dekstra. Nu, ne tro malfacile! La lerteco antaŭe akirita ankoraŭ ne estas tute forgesita. Kaj aŭdiĝis laŭdaj vortoj post mia dorso: “Tre lerte!” “Finfine ja de la kamparana deveno.” “Rigardu la studentinon, kion ŝi faras, faras bone.” Verdire oni troe laŭdis min, kio iom min embarasis.

La grupestro Chang-ran klarigis al ni, kiel konstrui la digon, distribuis la laborojn, kaj streĉa kaj entuziasma laboro komenciĝas.

La 9a de Aŭgusto. Vendredo

ĜIS hodiaŭa mateno, mi ankoraŭ regustumis la hieraŭan travivaĵon ĉe la digoj.

Ĝia konstruado ja ne multe diferencas de la konstruado de akvokonservejo. Multego da ŝtonoj estas bezonata, per kio oni masonas muregon por bari la inundakvon de sur la montoj.

Fraĉjo Yuan, la plejaĝa oĉjo kaj aliaj kvar-kvin personoj masonadis, fraĉjo la kvina, fraĉjo la dua, Tian-ran . . . elfosadis ŝtonojn. La aliaj iris supren. Ni virinoj nek scias masoni, nek povas elfosi tro grandajn ŝtonojn. “Ĉiu faru sian eblon”, do ni prenis sur nin la taskon de transportado: portadi unuope aŭ duope la ŝtonojn malsupren ruliĝintajn de sur la monto.

En la komenco, la ŝtonoj ja vere tre pezis al mi je ekporto. Mi pensis en mi: “Ne montru malfortecon! Ne postlasiĝu!” Kunpremite la dentojn mi levis ambaŭmane grandan ŝtonon, ĝin portis en la brakoj, kaj mi jam ne plu sentis ĝian pezecon. Rimarkinte, ke mi portas grandan ŝtonon, oĉjo diris zorgeme: “Unue portu la malgrandajn, lasu la grandajn al la viroj. Ja ankaŭ malgrandaj estas nepre bezonataj.” La grandajn ŝtonojn ni portis duope. Ni klopodis ĉiamaniere liveri al la masonantoj sufiĉe da materialoj. Poste, la fosantoj jam ne sukcesis provizi al ni, portantoj. Tiam ankaŭ mi prenis pioĉon kaj komencis fosadi. Estis ŝtono granda kiel muelilo, kiu estis neniel movebla, levebla, elfosebla. Subite mi ekpensis pri la principoj de levilo. Ni do puŝis unu finon de dika stango sub la ŝtonegon, kaj metis apog-ŝtonon sub la stangon. Tiel farinte, ni subpremis la alian finon de la stango, kaj jen, la ŝtono ekmoviĝis! “Kapablulino!” diris bofranjo la dua. Mi diris: “Granda estas nia kolektiva forto!”

Ŝtonoj amasiĝis antaŭ fraĉjo Yuan kaj aliaj masonantoj. Ili interkonsiliĝis kaj planis jen tiel

jen aliel, kvazaŭ ili intencus elmasoni ion mirindan. Do ankaŭ tio ĉi bezonas cerbumadon!

Ŝvitgutoj kovris ĉies vizaĝon. La vestaĵo de bofranjo la kvina jam tramalsekiĝis, sed ŝi vidiĝis ankoraŭ energiĝinta. Ruĝegas la vangoj de Feng-lan, kaj ŝiaj du grandaj okuloj palpebrumadis montrante neniom da laceco. En tiu momento ŝi fariĝis ankoraŭ pli bela—vere kiel floro en la montaro! Bofranjo la dua, la plejaĝa el ni ja estas malpli forta ol la aliaj, kaj devis iom ripozi sidante sur la tero. Mi estas ne ŝvitema, sed nun ŝvito fluadanta kvazaŭ rivereto de sur la vangoj en la kolumon. En la komenco mi sentis varmegon, sed poste, pro senĉesa ŝvitado, tion mi jam ne plu sentis, kaj mi eĉ sentis agrablon tra la tuta korpo. Mi pensis en mi: “Se mi tiel laboros por kelka tempo, mia malsano de cerbokorteksa laciĝo certe kuraciĝos.”

Transportado de ŝtonoj jam ne plu necesis. Mi prenis ŝovelilon kaj komencis ŝoveli teron laŭ la maniero de Tian-ran. Samtempe mi aŭdis la voĉon de oĉjo la unua de malsupre: “Jen, kiel vi opinias?” “Tre lerte efektive, nur vidu mem!” respondis bofranjo la dua. Kion ili diris plue, mi ne povis aŭdi klare. Mi ne kutimiĝis en manipulado de ŝovelilo, kaj veziko estiĝis sur la manoj. Vidinte, ke mi manipulis la ŝovelilon en malkorekta maniero, Tian-ran ekĝustigis min donante ekzemplon: “Qinjo, vi devas tiel ĝin manipuli, pli supren. . . .” Mi faris laŭ lia konsilo kaj trovis, ke estas vere pli oportune kaj pli facile. Estas nemalmulto lerninda ankaŭ en ĉi tio!

Kiam la suno estis tuj subironta, restis ankoraŭ kelkaj digoj konstruataj. Ĉiuj ekripozis denove. La ŝercema fraĉjo la dua min demandis: “Kia estas via rikoltaĵo?” “Unu granda *pao* (ĝi signifas en la ĉina “kanonon” aŭ “vezikon”),” mi respondis ridante. Kaj ĉiuj eksplodis de ridego.

Bofranjo la kvina denove prenis falĉilon kaj komencis falĉadi rubusojn. Post momento, ŝi jam kolektis grandan faskon da ĝi. “Vi falĉu,” diris fraĉjo la kvina, “sed mi ne portos por vi.” Mi sciis, ke fraĉjo la kvina ne volas bofranjon sin trolacigi. Chang-ran intermetis petoleme: “Nu, onjo la kvina, se li ne portus, ne preparu vespermanĝon por li.” Ridetante, bofranjo la kvina turnis al ni sian kapon kaj diris: “Kiu petus lin porti? Se mi povas falĉi, mi ja ankaŭ povos hejmen porti surdorse!” Estas vere bravaj homoj, lacon ne konantaj.

La konstruado finiĝis malfrue je la krepusko. Rigardante la pretigitajn digojn, ni ĉiuj ĝoje ridadis, oĉjo la plej aĝa estis tiel ĝoja, ke li karesadis sian grizan barbon kaj ne povis fermi sian buŝon: “Nun jam estas sekure. La akvego ne povos plu



“Qinjo, vi devas tiel ĝin manipuli, pli supren”

faligi la daktilarbojn.” “Ja ĉion zorgas la registaro,” diris fraĉjo la kvina, “ĝi ne preterlasas nian montvaleton.” Chang-ran aldonis: “Sen la kooperigo, kiu povus konstrui tiel multe da digoj? Se iu tion farus unuope, la konstruado estus nekompletigebla.” Ridante la viroj babiladis sen fino. Ĉar la virinoj deziregis tuj hejmeniri por kuirado, ni do reiris unuaj.

Kiam ni iris jam sufiĉe longan vojon, la viroj ankoraŭ tie sidadis senmove. El la kvietaj valo aŭdiĝadis gaja babilado kaj ridado.

Portante surdorse la kolektitan hejtajon, franjo la dua iris pli malrapide ol ni. Tiu ĉi virino, kiu antaŭe povis nur kulturi luitan teron, nun laboregas sindone. Ŝi diris: “Antaŭe mi deziris partopreni laboron sur la kampoj, sed kampon mi tiam ne posedis. Nun mi jam povas plenumi la deziron plene laŭvole.”

Feng-lan ne sukcesinte trapasi la ekzamenon por eniri liceon, jam decidis—per ŝiaj vortoj—“ripari la terglobon”.

Bofranjo la kvina portis surdorse grandan faskon da rubusoj, dum mi portis surŝultre nur ŝovelilon. Mi iris antaŭ ŝi. “Bofranjo la kvina,” mi

alparolis ŝin, "kial vi ne emas eĉ momenton ripozi?" Ŝi respondis: "Nenifarado nur ĝenas min. Se mi ne havus hejme tri infanojn, mi laborus ĉiutage sur la kampoj. Kia diferenco ekzistas inter la viro kaj virino?" Tiam mi ekmemoris la kverelon inter ŝi kaj fraĉjo la kvina, pri kio oni min informis: Foje, estis foira tago. La foirejo troviĝas en la 12-liaj foraj Xizhuang. Fraĉjo la kvina volis, ke la edzino rikoltu maizon surkampe kaj li mem iru al la foiro por aĉeti grenon. Sed bofranjo la kvina ne obeis lian ordonon: "Kial ne vi mem iru rikolti maizon kaj mi al la foiro por aĉeti grenon?" "Ĉu ne estas egale?" diris la edzo. "Se estas egale, do mi iru al la foiro." Antaŭe ekzistis ĉi tie tradicia kutimo, ke al foiro ordinare iras nur la viroj. Jen bofranjo la kvina intencis rompi la tradicion! Kaj poste ŝi efektive komencis mem iradi al la foiro. Ĉiuj laŭdis ŝian fortan karakteron kaj decidemon.

Jes ja, la leviĝo de l' socia pozicio de la virinoj multe dependas de ilia propra batalemo. Kvankam la Partio pretigis por ni ĉiujn necesajn kondiĉojn, tamen ni mem devas havi fortan volon kaj memregan povon kaj bone labori. Nur tiam ni estos respektataj. Mi tre estimas la batalemon de bofranjo la kvina.

La 10a de Aŭgusto. Sabato

MIA spirito vigliĝis de post la tago, en kiu mi partoprenis la digo-konstruadon. Mi ne plu sentis min tiel malforta kiel antaŭe. Mi profunde komprenas nur nun, ke fizika laborado povas ardigi la homan vivenerĝion.

Panjo diris al mi: "Se vi volus fari ŝuojn, ni havas materialon." Kvankam antaŭe ne venis en mian kapon la ideo fari ŝuojn, sed ŝia informo memorigis al mi la forgesitan promeson: En la jaro kiam mi lernis en la triajara klaso de malsupera liceo, mi vivis hejme por du-tri monatoj kaj faris kelkajn parojn da ŝuoj por mi mem. Dum gimnastikaj lecionoj, Jia Da-li tre ŝatis interŝanĝe porti miajn ŝuojn. Ŝi diris ke miaj ŝuoj estas tre komfortaj kaj petis, ke mi faru por ŝi unu paron. Senpripense mi promesis al ŝi ke mi nepre tion faros, kiam mi hejmeniros alfoje. Tempo pasadis. En iu somero, ŝi foje postulis de mi la promesitaĵon. Tiam mi respondis: "Mi ankoraŭ ne hejmeniris." Pli poste mi fojon hejmen revenis, sed tre mallonge mi hejme restis, ĝis nun mi ankoraŭ ne faris la ŝuojn por ŝi. Kion mi promesis al aliaj, mi memoras por ĉiam. Aŭdinte parolon pri ŝuoj, la figuro de Da-li tuj kvazaŭ aperis antaŭ miaj okuloj, kaj ŝiaj brilaj grandaj okuloj fiksrigardas min kvazaŭ dirante: "Kie estas la ŝuoj, kiujn vi promesis al mi?"

Mi parolis pri la afero al panjo. Ŝi tuj ekserioziĝis kaj diris emfaze: "Kial vi ne diris al mi pli frue, prokrastante la plenumon? Mi ne ŝatas homon kiu nur promesas, sed ne plenumas. Tuj faru nun!"

Ŝi estas homo honesta kaj malkaŝema. Ŝi estas sincera, decidema kaj laborema. Dum la duono de sia vivtempo ŝi estis muelita de mizero kaj suferoj, kio ŝin pli hardigis. Tamen ne mankas al ŝi la mildeco virina kaj amemo patrina. Ŝi ĉiam strikte plenumas sian vorton. Ŝi ne promesas senpripense, sed kion ŝi promesis, tion ŝi plenumas precize kiel horloĝo. Ŝi ne toleras al ni la kutimon de malrapidemo, prokrastemo kaj mallaboremo. Ŝiajn laŭdojn ni akiras tre malfacile. Kaj ŝi ne toleras ion maldecan en miaj agoj.

Sub ŝia kontrolo, hodiaŭ mi ekfaris ŝuojn por Da-li.

Mi faru por ŝi paron da broditaj ŝuoj. Belaj ŝuoj ja konvenas al la knabino. Mi pensis: Da-li certe ne atendas ke mi farus ŝuojn por ŝi dum tiuj ĉi ferioj, kaj eble delonge pensas en si, ke mi estas "giganto en vortoj, sed nano en agoj".

Ĉiam estu homo konfidinda! Kaj promeson plenumu!

La 12a de Aŭgusto. Lundo

SEN legado de tagjurnalo, oni estas kvazaŭ en mallumo. Nenion oni povas scii. Hejmen reveninte, mi havas tre bonajn interrilatojn kun lernantoj de la elementa lernejo, kaj petis ilin alporti ĉiutage por mi ĵurnalon de Xinzhuangvilaĝo. Kaj ili tion faris kun plezuro.

En la komenco ni legis nur por mi mem, kaj iujn fojojn ankaŭ laŭtleĝis por panjo. Sed hodiaŭ tagmeze venis fraĉjo la tria, li sidiĝis kaj komencis aŭskultadi atenteme. Post momento li foriris. Post alia momento venis multe da personoj: Chang-ran, Wang Fu, Tian-ran, bofranjo la dua. . . . "Qinjo, voĉlegu por ni la ĵurnalon," tuj diris Chang-ran enpaŝinte en la korton. "Kiel vi informiĝis, ke ĉi tie troviĝas ĵurnalo?" "Oĉjo la tria diris al ni."

Mi dubis, ĉu ili povas kompreni. Sed fakte ili scias ne malpli multe ol mi, precipe Chang-ran, kiu estante laborgrupa estro, ofte ĉeestas kunvenojn, aŭskultas paroladojn kaj ankaŭ mem iom legas. Mi do komencis laŭte legadi, kaj kelkfoje faris komentariojn. Li senĉese intermetis demandojn. Bofranjo la dua nur kapbalancadis, Wang Fu aŭskultadis silente kaj atente kun klinita kapo. Kaj Tian-ran min fiksrigardadis kun du grandaj okuloj, kvazaŭ iom cerbumante. Ilia atentema aŭskultado kuraĝigis min. Mi legis interesplene

kaj komentariis kun miaj propraj sentoj. Mi mem estas ekscitiĝema homo, kaj verŝajne mia emociiĝo ankaŭ ilin ekscitis.

Kiam estis tempo por iri labori en la kampo post siesto, ĉiuj stariĝis, nur Wang Fu sin movis malrapideme, kvazaŭ li ne volus foriri. Li estas homo retiriĝema, honesta kaj pacema. "Ja estas efektive utila al mi la informado," li diris. "Nun la kapo fariĝas kvazaŭ iom pli vigla." "La ĵurnalo tre bone klarigis la politikojn," rimarkigis Chang-ran. "Estus bone, se ni aŭskultus ĉiutage," diris Tian-ran. Verdire, mi tre volonte tion farus por ili. Kaj mi bedaŭris ke mi ne pli frue pensis pri tio kaj diris: "Nu, venu ĉiu tagmeze, mi voĉlegos por vi la ĵurnalon." "Tre bone!" diris ili.

La 14a de Aŭgusto. Merkredo

VEKTOPORTI akvon ĉiutage jam fariĝis mia kutimo, mi zorgadas, ke la akvujo estu ĉiam plenplena. Mi ankaŭ portis teron sur la tegmenton. En la komenco la ŝultroj doloris al mi pro



Vektoporti akvon ĉiutage jam fariĝis mia kutimo...

premado, sed mi persistis daŭre kaj pli poste la doloro ĉesis.

Laboro ja estas ĝoja afero. Nun mi jam ne miras pri la vortoj de oĉjo la plejaĝa: "Porti per vekto estas kvazaŭ veturi per palankeno." Vektoportante teron aŭ akvon mi sentas min nun tute komforta.

Ĉiutage, kiam la suno estas hejmen irona, mi iris sur monton kune kun miaj genevoj por kolekti hejtajon. Ankaŭ tio estas ĝuo.

Vidante ke mi ĉion ajn faras hejmenveninte, la onkloj kaj bofratinoj ĉiuj diris: "Ŝi ne fariĝis fremda studentino aŭ librovermo, sed restas ankoraŭ unu inter ni."

Elĉinigiis Li Shi-jun

(Daŭrigo de p. 65)

kun pajlotegmento subtenata de malalta ligna subportilo. Kiam ili mortis, tute senceremonie oni enterigis ilin en la teron, kaj kune entombigitaj estis nurkrudaj fajencoj kaj armiloj.

Kulto, Skribosignoj kaj Kalendaro La Shang-reĝoj kultis al siaj prauloj trege pompe, ke ĉiufoje farante la kulton, ili mortigis ofere centojn da bovoj kaj ŝafoj.

Ili petis de la prauloj aŭguron kaj protekton. Ili opiniis, ke iliaj agoj estis plenumado de la volo de la prauloj, kaj per tiu kredo ili timigis kaj obeigis la popolon. Ili trovis en tiu kredo efikan rimedon por subpremi la popolon.

Je aŭgurpetado oni gravuris skribsignojn sur testudan kirason aŭ bovoston pri la afero konsultita, pri la orakolo ricevita, kaj poste pri ĝia realiĝo. Nun oni nomas tion 'kirasosta skribo', kiu estas skribo hieroglifa kaj de kiu evoluiĝis la hodiaŭa ĉina skriba lingvo.

Pro bezonoj de la ĉiutaga vivo, kaj disvolviĝo de agrikulturo, la Shang-anoj jam posedis primitivajn sciojn sciencajn.

En la 'kirasosta skribo', troviĝis jam la numeraloj: de unu ĝis dek, cent, mil kaj dek mil.

Ili havis ankaŭ sian kalendaron. Ili kalkulis ĉiun rerondiĝon de la luno kiel unu monaton. La monato granda enhavas 30 tagojn, kaj la malgranda 29 tagojn. Unu jaro konsistas el 12 monatoj. Al superjaro aldoniĝas plia monato tiel ke tiu jaro enhavas 13 monatojn. La kalendaro rezultis el longtempa observado en agrikultura produktado kaj dank'al la kalendaro oni povis kalkuli la sezonojn por praktiki la terkulturon.

Esperantigis Zensto

SHANG-DINASTIO

(1766?—1122? a.K)

A. La Vivo de Shang-anoj


Reĝo Tang renversis Xia-dinastion kaj Pangeng al Yin translokiĝis La Shang-anoj de longe loĝis sur ambaŭ bordoj de la malsupra parto de la Flava Rivero, kiu de okcidento orienten fluas tra la norda Ĉinio. Tie troviĝas sur la fekunda grundo, abundaj akvoherboj. Ili paŝtis bovojn kaj ŝafojn kaj irigaciis kampojn per akvo de la Flava Rivero kaj ĝiaj branĉoj. Sed ĝi ankaŭ alportis al la Shang-popolo grandajn katastrofojn: ĝi de tempo al tempo inundis, detruis domojn, subakvigis la kampojn kaj forportis homojn kaj brutojn. Ili serioze batalis kontraŭ la superakvego de la Flava Rivero.

La ĉefo de Shang-anoj estis hereda kaj nomiĝis "Wang" (reĝo). Post morto de "Wang", la tronon heredis lia frato aŭ filo.

Ĉirkaŭ la dekkoka jarcento a.K., reĝo Tang de Shang-dinastio venkis kaj renversis la Xia-dinastion. De tiam la Shang-popolo okupis grandparte la mezajn kaj malsuprajn partojn de la Flava Rivero. Tiel komenciĝis la Shang-dinastio en la historio.

Dum tri cent jaroj post reĝo Tang, la ĉefurbo de Shang-dinastio translokiĝis kvin fojojn. Unu el la

Bronza jue-o




kaŭzoj estas inundo de la Flava Rivero. Ĉirkaŭ la dekkvara jarcento a.K., reĝo Pangeng sian ĉefurbon translokiĝis al Yin, kaj de tiam ĝi restis tie pli ol ducent sepdek jarojn. Tio montris, ke la Shang-popolo jam fariĝis multe pli kapabla por venki la naturajn katastrofojn.

La Bronzajo La Shang-anoj posedis jam la teknikon pri metalforĝado. Ili faris el alojo de kupro kaj stano diversajn objektojn.

Iliaj bronzaĵoj, kiujn oni trovis el fosadoj, konsistas el hakiloj, tranĉiloj, alenoj, kudriloj ktp.

Inter la bataliloj bronzaĵoj sin trovas 'ge', 'mao' (specoj de lanĉoj) ktp. La multe uzataj sagopintaĵoj estis ankaŭ el bronzo.

El bronzo ili faris ankaŭ vazojn por manĝo kaj vino, inter kiuj estis 'ding' (vazo tripieda kun du oreloj), 'jue' (kaliko kun piedoj) ktp.



Sagopintoj

Agrikulturo, Bestbredado kaj Metioj Altvaloraj estis la bronzaĵoj kies forĝado estis en la manoj de la aristokratoj. En la agrikultura produktado, la laboruloj povis uzi nur laborilojn el ligno kaj ŝtono.


En terkulturado, la Shang-anoj uzis 'lei' el ligno. Tio estas dudenta plugilo, kun lignopeco horizontale alifiksita al la tenilo tiel, ke la terkulturisto povis sur ĝin piedpremi, kiam li puŝis per la manoj la tenilon por enŝovi la dudenton en la teron, kaj ĝin plugi. Sur la tiel plugita tero ili semis rizon, tritikon, milion kaj gluecan milion.

Por irigaciado la Shang-anoj fosis akvofluejojn ĉirkaŭ la kampoj por enkonduki akvon el la rivero.

Kiam venis la sezono por rikoltado, ili falĉis grenon per falĉiloj ŝtonaj aŭ konkaj.

Ili ankaŭ plantis morusarbojn, per kies folioj ili bredis silkraŭpojn.

Ankaŭ bestbredado estis unu el gravaj branĉoj de produktado de la Shang-anoj. La brutoj, kiujn ili bredis, konsistis el porkoj, hundoj, ĉevaloj, bovoj kaj ŝafoj. Kokoj estis iliaj kortbirdoj. Ĉevaloj jam estis uzataj por tiri ĉaron. La reĝa veturilo kaj batalĉaro estis ofte tirataj per kvar ĉevaloj.



Bronzajoj: 1. Hakilo 2. Mao 3. Ge

Ili ofte ĉasis. La felo de la bestoj estis uzata por fari vestojn. El ostoj kaj kornoj ili faris batalilojn kaj laborilojn.

Metioj disvolviĝis jam dum Shang-dinastio. Oni faris vinon el greno. Virinoj teksis silkajon el silko, tolon el lino. La bestaj feloj liveriĝis kiel materialo por ledfarado. En la ĉefurbo estis sufiĉe grandaj metiejoj por produkti kuprajn, ŝtonajn, ostajn kaj jadajn objektojn, tre delikatajn kaj belajn.


B. La Socisistemo kaj Kulturo de Shang-dinastio

La Sklava Socio Shang-dinastio estis sklava socio, en kiu troviĝis tri klasoj: sklavoj, kamparanoj kaj aristokratoj.

La aristokratoj faris la militkaptitojn sklavoj, kiujn ili devigis labori. Kun ŝnuro ĉirkaŭ la kolo la sklavoj estis amase pelataj kulturi sur la kampoj, kaj ilin postsekvis gardistoj kun vipoj en mano. Ankaŭ en metiejoj de la ĉefurbo la sklavoj pene laboris de mateno ĝis nokto kiel brutoj.

La aristokratoj donis al ili nur malgrandajn porciojn de krudaj nutraĵoj. Ilia vivo estis sen garantio. Ili estis ofte mortigitaj de la aristokratoj.

La kamparanoj kulturis teron per simplaj kaj krudaj agrikulturiloj, rikoltis malabunde, kaj parton el la rikolto ili devis fordoni al la aristokratoj.




Bronza Ding-o

La aristokratoj ekspluatante la sklavojn kaj kamparanojn, vivis pompe kaj lukse. En la bronzaĵ 'ding'-oj estis bovajo kaj ŝafajo, kaj la bronzaĵ 'jue'-oj estis plenaj de vino. Kaj ili drinkadis diboĉe.

La Palaco kaj Tombo Tre granda kaj vasta estis la palaco de la reĝo. Ĝi konsistis el kelkdek konstruaĵoj, el kiuj la plej granda longas je 60 metroj kaj larĝas je 10 metroj. En la palaco troviĝis kelk-centoj da grandaj keloj, kie abunda provizo da grenoj kaj riĉaĵoj estis konservata.

Kiam la reĝo mortis, li estis enterigita en gigantan tombon, kaj kune entombigitaj estis centoj da vazoj el oro, jado, kupro, kaj diversaj bele gravuritaj ŝtonaĵoj. En la tombo kuŝis ankaŭ multaj kune enterigitaj, unuj entombigitaj vivaj, aliaj antaŭe senkapigitaj. Nombris ofte je kelk-centoj la kune enterigitaj sklavoj.

Gravurita skribaĵo sur testuda kiraso



La loĝejoj de la popoloj estis tre simplaj kaj primitivaj: malgranda terkavo

(Daŭrigo sur p. 63)

Deveno de la Fajro

EN la pratempo sin trovis lando en tre malproksima okcidento nomata Suiming. Ĝin atingis nek la lumo de la suno nek tiu de la luno. La lando ne konis la ĉielan lumon, nek la tagon kaj nokton.

Kaj en tiu lando estis mirinda arbego nomata Sui. Ĝi estis eksterordinare grandega, ke ĝiaj branĉoj kaj folioj kovris areon de miliono da muoj.

Foje iu saĝulo, kiu vojaĝis tra la tuta mondo kaj vagis tre tre malproksime ĝis li ne povis plu vidi la sunon kaj lunon kaj tiel li venis al la lando Suiming. Li ekripozis sub tiu *sui*-arbo, kiu ombris areon de miliono da muoj. Oni certe imagas, ke sub la arbo devus esti des pli mallume, pro tio ke la lando mem ja ne konis ĉiellumon. Sed kiom mirinde, ke la realo montriĝis tute alia: Sub la arbego ĉie ja fulmadis belaj ekbriloj, kiuj per pompeco de juveloj kaj brilantoj lumigis la landon. La loĝantoj de Suiming-lando, kiu ne konis ĉiellumon, laboris kaj ripozis, manĝis kaj dormis ĝuste en la lumo de tiuj belaj ekbriloj. Kiam la saĝulo scivoleme esploris la fenomenon, li trovis, ke la lumo devenas de la bekado de multaj birdegoj kontraŭ la arbo (eble por elbekado de vermoj). La birdoj laŭ aspekto iom similas al pandiono kun longaj ungoj, nigra dorso kaj blanka ventro. Kiam ili frapis la arbon per sia mallonga sed malmola beko, tuj disjetiĝis brilaj fajreroj.

Tion vidinte, la saĝulo subite ekkomprenis kiel oni povas akiri fajron. Li rompis branĉojn de la arbo kaj per malgranda boris la grandan. Efektive brilaj fajreroj tuj eljetiĝis ĉe la borado. Sed tre

bedaŭrinde la fajreroj tiel ricevitaj el la arbo tuj estingiĝis post la ekbrilo sen estiĝo de flamo.

Poste li tion provis per branĉoj de alispecaj arboj. Kvankam de ili fajreroj venis ne tiel facile kiel de la *sui*-arbo, tamen post iom longa borado, el la branĉo estiĝis fumo kaj fine ĝi bruliĝis. Tiel li ricevis la fajron.

Reveninte hejmlandon li tion instruis al sia popolo. Ekde tiam la uzado de fajro pli kaj pli disvastiĝis. Oni povis ĝin akiri kiam ajn laŭ bezono. Ne necesis plu atendi la fajron de fulmotondro, nek tagnokte gardi ĝin por ke ĝi ne estingiĝu. La eltrovinton de la rimedo akiri fajron per lignoborado oni ĉiam memoras kaj lin nomas *Suiren*, kio signifas fajroprenanton.

Elĉinigiĝis HONFAN

Sciigo al la Legantoj

Kun bedaŭro ni devas sciigi al vi, ke la malnova abonkotizo de nia gazeto ne povas kovri la eldonkoston, kaj por daŭrigi nian servon al nia komuna Esperanta afero ni devas 1) uzi paperon malpli kostan; 2) altigi la abonkotizon. Al la jam pagintaj abonantoj ni ne petas plian pagon.

Ĉina Esperanto-Ligo



Ilustris Mi Gu

(Daŭrigo de p. 67)

nigra generalo, por malebligi movon de la nigro), 車 b4 — i4.

3. 車 h8 — j8 †, 帅 j6 — i6.

4. 車 j8 — i8, 帅 i6 — h6 (la nigra generalo ne povas retroiri al j6, ĉar 5. 砲 i3 — j3 matigi).

5. 車 i8 — g8! nigro rezignas (ĉar se ĝi movas 帅 h6 — i6, 6. 車 g8 — g6, nigro ne povas ŝirmi per eskortanto, kiu estas fiksita de ruĝa kanono; se ĝi ekstermos kanonon, t.e. 5. 車 i4 x i3, do 6. 車 g8 — g6, la nigra generalo povos moviĝi nenien, ĉar kontraŭvizaĝi la ruĝan generalon estas malpermesata).


La Ĉina Ŝako

LA ĉina ŝako estas unu el la plej popularaj ludoj en nia lando. Inter ĝi kaj la internacia ŝako ekzistas multe da simileco. Eble ĝi interesus ankaŭ la esperantistojn. Jen mi klarigas la elementajn regulojn de tiu ĉi ludo.

I. La Ŝakpecoj kaj Ŝaktabulo

Simile al la internacia ŝako, ankaŭ la ĉina ŝako estas ludata de du rivaloj. Ĉiu el ili estas provizata per 16 ŝakpecoj, nome: 1 generalo; po 2 eskortantoj, elefantoj, ĉevaloj, ĉaroj, kanonoj kaj 5 peonoj. Diference de la internacia ŝako, la ŝakpecoj de la ĉina ŝako ne estas figuroj, sed disketoj sur kiuj gravuriĝas la nomoj de la ŝakpecoj. Unu ludanto uzas ruĝajn pecojn, kaj la alia nigrajn.

La ĉina ŝaktabulo estas kvadrato desegnita per 10 horizontalaj kaj 9 vertikalaj linioj. La spaco inter la kvina kaj sesa horizontalaj linioj estas nomata "lim-rivero", kiu rompas 7 el la 9 vertikalaj linioj kaj apartigas la propran kaj rivalan flankojn. La tuta tabulo enhavas 90 kruciĝajn punktojn, sur kiuj moviĝas la ŝakpecoj (vidu la suban diagramon).



mon). La pozicioj antaŭkomencaj de la ŝakpecoj estas kiel en la supra diagramo.

II. Movo de la Ŝakpecoj

1. **Generalo 帥**: moviĝas vertikale aŭ horizontale nur unu paŝon ĉiufoje interne de la urbo, t. e. la spaco inter la kvara kaj la sesa vertikalaj kaj la unua kaj tria horizontalaj linioj de ambaŭ flankoj.

2. **Eskortanto 士**: moviĝas diagonale nur unu paŝon ĉiufoje interne de la urbo.

3. **Elefanto 象**: moviĝas diagonale du paŝojn ĉiufoje interne de la limrivero. Se troviĝas iu ajn ŝakpeco sur la unua paŝo, la movo estas malhelpata.

4. **Ĉevalo 馬**: moviĝas ĉiufoje unu paŝon vertikale aŭ horizontale kaj poste ankaŭ unu paŝon diagonale antaŭen. Se troviĝas iu ajn ŝakpeco sur la unua paŝo, la tuta movo estas malhelpata. Tio ĉi ebligas matigi per ĉevalo formovante la malhelpan ŝakpecon.

5. **Ĉaro 車**: moviĝas vertikale aŭ horizontale je ajna distanco.

6. **Peono 卒**: moviĝas ĉiufoje nur unu paŝon kaj nur antaŭen. Sed transirinte la riveron ĝi povas moviĝi ankaŭ horizontale.

La suprediritaj ses ŝakpecoj ekstermas ŝakpecojn de la rivalo laŭ la moviĝa maniero, t. e. tiu kiu moviĝas antaŭen, ne povas ekstermi diagonale, kaj tiu kiu moviĝas diagonale, ne povas ekstermi antaŭen.

7. **Kanono 砲**: moviĝas simile al la ĉaro, t. e. vertikale aŭ horizontale je ajna distanco; sed ĝi povas ekstermi aŭ ataki nur kiam inter ĝi kaj la ŝakpeco atakata aŭ ekstermota ekzistas unu, kaj nur unu ŝakpeco ĉu ruĝa aŭ nigra.

III. Ĉefaj Reguloj de Venko kaj Malvenko

a) Tiu, kiu matigas la rivalan generalon, gajnas la partion.


b) Plenhalti, konstante ataki la generalon aŭ certan ŝakpecon neprotektatan de la rivalo — ĉio ĉi estas konsiderata kiel perdo de la partio.

c) Kiam neniu flanko havas superecon super la rivalo, la partio finiĝas sen gajnanto.

Konstante ataki certan ŝakpecon protektatan de la rivalo estas rigardata kiel "egaliĝo".

ĉ) Kvankam la generalo povas moviĝi nur en la urbo kaj ĉiufoje nur unu paŝon, tamen koncerne al la rivala generalo ĝi havas specialan povon: se la generalo estas devigata (ekz. atakate) rekte kontraŭvizaĝi al la rivala generalo (t. e. neniu ŝakpeco troviĝas inter ili), ĝi matas.

IV. Ekzemplo de Matigo RUĜO MOVAS KAJ GAJNAS



1. 車 h3 — h8! (ebligi samtempe matigi la generalon dumaniere: a. 砲 c3 — j3 †, la nigra generalo matos; b. 車 h8 — j8 †, nigro ne povas movi 士 i5 — j6, alie la nigra generalo kontraŭvizaĝos rekte al la ruĝa generalo. Tial, nigro devas movi), 帥 j5 — j6.

2. 砲 c3 — i3! (regi la punkton i6 kiu estas la sola elirejo de la

PEONIO

JIA ZU-ZHANG

P EONIO (ĉine: *mudan*) estas planto el la familio de ranunkolacoj, kiuj plejparte estas grim-pantaj kreskajoj herbecaj aŭ lignecaj. Sed nur peonio estas malgranda arbusto. Ĝi havas fraton, kiu estas herbeca peonio (ĉine: *shaoyao*). Ambaŭ ili havas florojn kaj foliojn tre similajn. Sekve en

Peonio kaj Kolomboj

de Yu Fei-an



antikveco, peonio estis ankaŭ nomata ligneca *shaoyao*.

La trunko de peonio ĝenerale altas ses aŭ sep futojn, sed tiu en la suda Ĉinio povas atingi la altecon de dek futoj. Ĝi havas du- aŭ tri-foje plumformajn pluroblajn foliojn kun longeco de sep ĝis ok koloroj. Ili havas helverdan surfacon kaj blankan polvon sur la dorso. Kiam ili estas junaj, ili ĝenerale havas ruĝan tonon. La floroj sidas solaj sur branĉosuproj kaj havas kvin verdajn foliolojn. Antaŭe la floroj havis ankaŭ kvin petalojn, sed post kulturado parto de la stamenoj ŝanĝiĝis en petalojn kaj la floroj fariĝis mult-petalaj. En la antikva tempo tiuj kiuj havis malpli da petaloj estis nomataj 'mult-petalaj', dum kiuj havis multe da petaloj estis nomataj 'mil-petalaj'. Forvelkinte la floroj lasas post si foliklojn, kiuj entenas kelkajn karnecajn semojn.

La Peonioj

I UN vintromezon, kiel estas rakontite en legendo, la tirana imperiestrino Wu (684-704) volis viziti sian palacan ĝardenon ĉe Chang'an. "Morgaŭ mi iros al mia ĝardeno," ŝi dekretis. "La Printempo estas ordonita ĉiujn florojn ekflorigi ĉe la tagiĝo." Kiam la imperiestrino alvenis la duan tagon, ŝi trovis brilan paradon de floroj, ĉiuj krom la peonioj, kiuj obstine rifuzis submetiĝi al ŝia despota kaprico. La imperiestrino ekfuriozis kaj ekzilis la peoniojn al Luoyang en Henan-provinco. Kaj tial la plej belaj peonioj troviĝas tie ĝis nun.

Tri cent jaroj post la imperiestrino Wu, dum la regado de la imperiestro Ren Zong de Song-dinastio (960-1279), kiel la legendo rakontas, en vilaĝo proksime de Luoyang estis mirinda ĝardeno nomata "Eterna Ĝojo". Ĝi apartenis al maljuna Qiu Xian, kiu la florojn amis tiel forte, ke oni nomis lin "La Flor-frenezulo". Lian ĝardenon beligis la rozoj kaj kamelioj en printempo, lotusoj kaj granatoj en somero, krizantemoj kaj osmantoj en aŭtuno, narciso kaj prunfloroj en vintro. Ĉiuj tiuj ĉi floroj kaj mil aliaj estis kulturitaj de maljuna Qiu, kies peonioj estis aparte famaj. Sed li malofte permesis al vizitantoj enveni internen de la alta bambubarilo. Kaj eĉ se li donis permeson, oni povis nur admiri la florojn de malproksime.

Ne malproksime vivis junulo, nomata Zhang, riĉa sentaŭgulo, kiu ŝatis montri sian povon per malbonfaroj al siaj najbaroj. Iun tagon li kaj liaj

En Sun Yat-sen Parko, Pekino estas plantitaj entute pli ol 600 peoni-arbustoj el pli ol 40 specoj, inter kiuj estas 'yao-flava', 'wei-purpura', 'zhao-ruĝeta', 'kunshan-noktbrilo', 'lantian-jado', 'song-blanka', 'fabo-verda', ktp. Plurajn specojn oni povas legi en koncernaj verkoj de antikvuloj.

Por generi peoniojn ekzistas tri rimedoj—radik-divido, inokulado kaj semado. Radik-divido, kiu estas aplikata nur al la radiko de iu variaĵo kaj mem ne produktas novan variaĵon. Sed kruĉigo per inokulado kaj semado facile kondukas al la kreado de nova speco.

Post la florado de peonio oni kutime fortranĉas la branĉpinton por malebligi la fruktiĝon, eviti la konsumiĝon de nutraĵo kaj tiel garantii la ĉiujaran abundecon de floroj.

Trad. I. Ko

de Luoyang

amikoj preterpasis la ĝardenon. Allogate de la beleco de la peonioj de maljuna Qiu en plena florado, ili eniris en la ĝardenon, kaj Zhang arogante proponis aĉeton de la tuta ĝardeno. La maljunulo simple rifuzis vendi. Koleriĝinte Zhang teren piedpremis ĉiujn peoniojn kaj foriris.

Kiam maljuna Qiu kaŭris ploranta inter siaj dispremitaj floroj, aperis antaŭ li bela junulino. Ŝi petis lin alporti pelvon da akvo kaj diris ke ŝi helpos revivigi la florojn. Kiam li revenis, la junulino jam foriris, sed li trovis, ke ĉiuj peonifloroj residas sur siaj trunketoj eĉ pli belaj ol antaŭe—nova purpura nuanco en la rozkoloraj, strekoj de ruĝo en la blankaj. La maljunulo konstatis ke lia vizitinto estas fe no. Plena de miro kaj ĝojo, li diris al si mem: "Mi estis tro egoisma pri miaj floroj en la pasinteco. Se mi estus tiel grandanima kiel ŝi, la malfeliĉaĵo povus esti evitita." Li malfermis do sian ĝardenon al ĉiuj, kiuj volis ĝin vidi.

La okazintaĵo pri la peoni-feino rapide disfamigis. Ankaŭ sentaŭgulo Zhang ĝin aŭdis, kaj decidis profiti ĝin por plenumi sian fiintencon. Li denunciis maljunan Qiu kiel sorĉiston, kaj tiu ĉi estis jetita en malliberejon. Dume Zhang kaj liaj amikoj denove entrudis sin en la ĝardenon. Sed ili trovis kun surprizo la peoniojn dispremitajn sur la tero, ĝuste kiel ili tiujn forlasis. Subite ekblovis ventego kaj la piedpremitaj floroj ŝanĝiĝis en belajn junulinojn,

kiuj svingante siajn longajn manikojn fortimigis la entrudiĝintojn kriante: "Venĝu ni Majstron Qiu!". La vento tiel subite kvietiĝis kiel ekblovis. La impertinentaj junuloj estis terurigitaj sed neviditaj—krom Zhang. Li falis kun la kapo malsupren en amaso de fekaĵo, jam morta.

La sekvintan tagon, la urbestro sciigis pri la sorto de Zhang. Samtempe li ricevis petskribon kun subskriboj de cent najbaroj, por malkovri la konspiron de Zhang kaj peti liberigon de Qiu Xian. La maljunulo estis tuj liberigita. Kaj la urbestro publikis ordonon malpermesantan al ĉiu deŝiri aŭ detruji liajn florojn.

Qiu Xian de tiam vivis pli simple kaj bonkore ol antaŭe. Li vendis fruktojn de liaj arboj kaj distribuis la enspezon al la bezonantoj. Kelkajn jarojn poste, meditante en sia ĝardeno en la nokto de la Aŭtunmeza Festo, li aŭdis sonon de ĉiela muziko. La Ĉiela Intendanto de Floroj kun sia sekvantaro, malsupren ŝvebis al li sur multkoloraj nuboj. "La Ĉiela Imperiestro nomis vin Gardisto de Floroj", ŝi anoncis. "Vi leviĝos al la ĉielo kun via ĝardeno. De nun vi gardos ĉiam tiujn, kiuj amas kaj zorgas florojn, kaj punos tiujn, kiuj ilin vundas kaj detruas."

Maljuna Qiu kaj lia ĝardeno flugis tuj poste supren al la ĉielo antaŭ la okuloj de ĉiuj liaj najbaroj kaj post tio "Eterna Ĝojo" alinomiĝis "Vilaĝo de Cent Floroj".

Esperantigis Zensto



Kiam maljuna Qiu kaŭris ploranta inter siaj dispremitaj floroj, aperis antaŭ li bela junulino.
Pentris Wang Shu-hui

Kial Fonetika Alfabeto de Han-lingvo?

LA ellaborado kaj disvastigado de Han-lingva Fonetika Alfabeto estas unu el la ĉefaj taskoj de nia skribo-reforma laboro.

La celo de la nuna laboro pri skriba reformado estas faciligi la lernon kaj uzon de Han-ideografiaĵoj por la popolo, unuigi paŝon post paŝo ilian prononcon kaj fine unuigi la Han-nacian parolan lingvon, por ke nia lingvo estu pli bone kaj pli facile uzata de la popolo buŝe kaj skribe, servu pli efike al la socialisma konstruado de nia lando, sed ne aboli la Han-ideografion.

La nunaj taskoj de la skribo-reformado konsistas el: (1) simpligi Han-ideografiaĵojn por fari ĝian lernon kaj uzon facila; (2) disvastigi la ĝeneralan parolan lingvon prononce normigitan laŭ la Pekina dialekto, por iompostiome unuigi la parolan lingvon de Han-nacio; (3) ellabori kaj disvastigi Fonetikan Alfabeton de Han-lingvo, por indiki la prononcon de Han-ideografiaĵoj, por faciligi ilian lernadon kaj elparoladon kaj por vastigi la ĝeneralan parolan lingvon.

La Han-ideografiaĵoj ne indikas sian prononcon per si mem, kiun oni devas lerni kaj memori tute aparte. Tio ja estas unu el la malfacilaĵoj por ilin posedi. La kreo de la Fonetika Signaro en 1913

estis granda antaŭenpaŝo en klopodado de sonindiko de Han-ideografiaĵoj. Tamen ĝi estas malfacila por ekkonado, skribado kaj uzado.

La nuna sistemo de Han-lingva Fonetika Alfabeto alprenis por si la internacie uzatajn latinajn literojn por signi la sonon de Han-ideografiaĵoj kaj faciligi la lernadon de ĝenerala parola lingvo. Ĝi estas do plia granda paŝo antaŭen de la Fonetika Signaro.

Disvastigado de tiu ĉi alfabeto ludos aktivan kaj grandan rolon por levi la kulturalan nivelon de la vastaj popolamasoj kaj por vastigi la normigitan prononcon de Han-lingvo tra la tuta lando. Kiam niaj naciminoritatoj kreas kaj reformas sian skriban lingvon, ĝi povas servi kiel komuna bazo. Kaj ili povas ankaŭ lerni Han-lingvon per ĝi. Tio helpas al reciproka lernado kaj komunikado inter ĉiuj nacioj de la lando. La terminoj kaj signoj uzataj en scienco kaj tekniko kaj latinigo de ĉinaj nomoj por fremdulo ankaŭ povas esti skribataj per ĉi tiu alfabeto.

Krome, la lingvistoj povas ankaŭ ĝin utiligi en siaj studoj kaj eksperimentoj pri plua reformo de la ĉina lingvo.

Esperantigis ZENSTO



LA UNUA ĈINA-KROATA LERNOLIBRO PRESOTA EN DALMATA URBETO

En Jugoslavio baldaŭ aperos la unua ĉina-kroata lernolibro, kompilita de Mile Dopor, kiu komencis okupiĝi pri la ĉina lingvo de la jaro 1941. Kiam li elkonis la plej esencajn karakterizojn de la lingvo, elparolon kaj akcenton, li komencis kompili la lernolibron. Sian lingvoscion li havis okazon plurfoje elmontri (dum restado de diversaj delegitaroj ĉinaj en nia lando).

Kiam la lernolibro estis preta kaj kontrolita, ekestis malfacilaĵoj kun litertipoj. Li turnis sin al la presejo de la plej granda ĉina tagjurnalo "Renmin Ribao" en Peking, kiu respondis ke la litertipoj estos senditaj donace. En malgranda apudmara urbeto Korĉula, sur la samnoma dalmata insulo, la loka presejo faras jam la necesajn preparojn por komenci presi la lernolibron.

La lernolibro enhavos proksimume 300 frazojn kun pli ol 2500 vortoj plej ofte uzataj.

Informis: **Prof. Marinko Ĝivoje** (Ljubljana)

Dong Yan-shou:

La Velo


"Fraĉjo!" velo diris al masto: "vi estas tirana al mi, tiel firme ligante min al via korpo. Ĉu vi ne permesas al mi agi libere?"

La masto ne respondis. La velo koleregis, kaj ekkriis furioze: "Kia maljustaĵo! Mi havas kapablon kaj povas labori memstare, kial mi bezonas dependi de vi?"

Sekve, la velo forlasis la maston. Sed antaŭ ol ĝi havis tempon por ĝoji, marvento jam ĝin forblovis. La sekvantan matenon, fiŝkaptisto ĝin elakvigas. Depremite ĝi diris plorante al la masto: "Bone! vi forjetis min! De nun, mi neniam kunlaboros kun vi! Mi vidos, kiel vi povas irigi la ŝipon!"

Tamen, la masto ankoraŭ ne respondis al ĝi. Forviŝinte la larmojn, la velo ekrigardis kaj jen trovis ke lia loko jam estas okupata de alia velo!

Esperantigita de ZHANG JING-QIU



Danco kun longaj silkaĵoj de Han-nacio



Pavo-danco de Tai-nacio



Danco de trio de Li-nacio

Rapiro-danco de Han-nacio

ĈINAJ DANCOJ

Ĉinio estas multnacia lando, ankaŭ ĝia dancarto estas multspeca kaj diverskolora.

Tibeta danco de Labrang-festivalo





BIJOTTEKA UNIVERSTEIT
KUL